



EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

12
1970

Saluton al la 21-a datreveno de la fondiĝo de la granda Ĉina Popola Respubliko!

Vivu la granda Ĉina Popola Respubliko!

Vivu la granda, glora kaj ĝusta Komunista Partio de Ĉinio!

Vivu la granda Marksismo—Leninismo—Maŭzedongpenso!

Vivu la granda gvidanto Prezidanto Maŭ!



La granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima kunbatalanto Vicprezidanto Lin Biaŭ celebras, sur Tian-anmen-pordego, la 21-an datrevenon de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, kune kun la armeanoj kaj popoloj de la ĉefurbo.



Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj Samdek Norodom Sihanuk, ŝtatestro de Kamboĝo kaj prezidanto de la Nacia Unueca Fronto de Kampuča, kune rigardas artfajraĵojn sur Tian-anmen-pordego.



Vespero de la Nacia Festotago



Goje kantante kaj dancante, la vastaj revoluciaj amasoj trapasas Tian-anmen-placon por ricevi revuadon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj Viceprezidanto Lin.





Gastoj el Albanio kaj aliaj landoj ĝoje celebras nian Nacian Feston kune kun nia popolo.

Pli ol cent mil popolanoj sur Tian-anmen-placo formas per bukedoj en siaj manoj kvin gigantajn ĉinajn ideografiajn signifantajn "Vivu Prezidanto Maŭ".





La kolono de la laboristoj kun plena fervoro kaj alta batalvolo trapasas Tian-anmen-placon.

Malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de la antaŭurboj de Pekino trapasas Tian-anmen-placon kun gigantaj modeloj simbolantaj la agrikulturan riĉan rikolton de nia lando.



Parolado de Vicprezidanto Lin Biao

en la Mitingo por Celebri la 21-an Datrevenon de la Fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko

Gekamaradoj kaj geamikoj:

Alvenis la brila festotago de la 21-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, la socialisma patrolando kreita de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

En la nomo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj de la Registaro de la Ĉina Popola Respubliko, mi adresas salutojn al la laborista klaso, la malriĉkamaradoj kaj malsuperaj mez-kamaradoj, la ruĝgvardianoj, la revoluciaj kadroj kaj la revoluciaj intelektuloj de la tuta lando! salutojn al la popoloj de ĉiuj naciecoj de la tuta lando! salutojn al la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj la milico! salutojn al ĉiuj personoj kaj transmaraj elmigrantaj samlandanoj, kiuj amas nian socialisman patrolandon! kaj esprimas varman bonvenigon al la honorindaj gastoj, amikoj kaj kamaradoj venintaj el diversaj landoj de la mondo!

En la pasinta unu jaro, alte tenante la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso kaj direktate de la linio de unuiĝo kaj venko de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio la tutlanda popolo grandpaŝe marŝis antaŭen kaj akiris senĉese novajn venkojn sur ĉiuj frontoj. Daŭre profun-

diĝis la revolucio sur la politika kaj ideologia fronto, kultura kaj eduka fronto, ekonomia fronto kaj en ĉiuj kampoj de la superstrukturo. Estas leviĝanta nova alta tajdo de la grandaj socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. En agrikulturo, industrio, komerco, kulturo, eduko, higieno, scienco, tekniko kaj aliaj flankoj ĉie regas arda vigleco kaj prospero. Multe fortiĝis la nacia defendo de nia lando. La proletara diktaturo de nia lando estas senprecedence firma.

En ĉi tiu brila festotago, ni gratulu la tutlandan popolon pro ĝiaj grandaj sukcesoj akiritaj en la amasa movado de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso, grandaj sukcesoj en la movado de batalo, kritiko kaj reformo de la Granda Proletara Kultura Revolucio kaj grandaj sukcesoj en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado kaj la Popolan Liberigan Armeon, la vastan milicon kaj la tutlandan popolon pro la grandaj sukcesoj akiritaj de ili en plifortigo de preparo kontraŭ milito kaj en plifirmigo de nacia defendo!

En la mondo, nun aperas nova alta tajdo de la batalo kontraŭ la usona imperiismo. Ĝuste kiel Prezidanto Maŭ montris en sia solena deklaro publikigita en la



20-a de majo de la kuranta jaro: **“La danĝero de nova mondmilito ankoraŭ ekzistas, kaj la popoloj de ĉiuj landoj nepre devas sin prepari. Sed, nun la ĉefa tendenco de la mondo estas revolucio.”** En la sfero de la tuta mondo, vige disvolviĝas la popola revolucia batalo kaj senĉese plifortiĝas kaj plivastiĝas la kontraŭusona unueca fronto. La usona imperiismo kaj la social-imperiismo estas ekstreme izolitaj kaj havas tre malfacilajn tagojn. La internaciaj rilatoj de nia lando disvolviĝas tagon post tago. Niaj amikoj troviĝas ĉie tra la mondo.

En la tempo por celebri la unuan Nacian Feston en la sepdekaj jaroj, nia tuta Partio, tuta armeo kaj tutlanda popolo devas, responde al la alvoko de la Dua Plena Sesio de la Naŭa Centra Komitato de la Partio, persisti en la daŭra revolucio sub la proletara diktaturo, persisti pri la proletaraj revolucia linio kaj politikoj de Prezidanto Maŭ kaj daŭre plenumi diversajn batalajn taskojn elmetitajn de la Naŭa Kongreso de la Partio.

Ni devas daŭre disvolvi profunden la amasan movadon de viva studo kaj viva

apliko de Maŭzedongpenso kaj memkonscie remuldi nian mondkoncepton per Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso en strikta ligo kun la praktiko de la tri grandaj revoluciaj movadoj — klasbatalo, porprodukta batalo kaj scienca eksperimentado. Ni devas serioze studi la filozofiajn verkojn de Prezidanto Maŭ, pledi por dialektika materiismo kaj historia materiismo kaj oponi kontraŭ ideismo kaj metafiziko. Ni devas scii bone fari enketon kaj studon, resumi sperton kaj analizi la kontraŭdirojn de aferoj kaj ĝuste koni kaj reformi la mondon.

Ni devas daŭre teni firme la amasan revolucionan kritikon, elimini la restantajn venenajn influojn de la kontraŭrevolucia reviziisma linio de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj konduki la movadon de batalo, kritiko kaj reformo ĝis la fino.

Ni devas firme kapti la batalon inter la du klasoj, la du vojoj kaj la du linioj kiel la ĉefĉeneron, por daŭre puŝi antaŭen la novan altan tajdon de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado kaj energie batali por plenumi kaj superplenumi la naciekonomian planon de 1970 kaj la Trian Kvinjaran Planon kaj bone meti la fundamenton por la Kvara Kvinjara Plano.

Ni devas serioze plenumi la taskojn de ordigo kaj konstruo de la Partio kaj plifortigi la ideologian kaj organizan konstruon de la Partio kaj pluapaŝe disvolvi la gvidan rolon de la avangardo de la proletaro.

Ni devas daŭre plifortigi la konstruon de la Popola Liberiga Armeo kaj la milico, daŭre teni firme kaj plifortigi la laboron de preparo kontraŭ milito kaj **altigi singardemon, defendi la patrolandon**. Ni nepre liberigos Tajvan!

Ni devas persisti pri la proletara internaciismo, firme subteni la albanan popolon en ĝia batalo kontraŭ imperiismo kaj reviziismo, firme subteni la popolojn de Vjet-

namio, Kamboĝo kaj Laoso en ilia naci-sava milito kontraŭ la usona agreso, firme subteni la korean popolon, la japanan popolon kaj la popolojn de la sudorient-aziaj kaj aliaj aziaj landoj en ilia batalo kontraŭ la usona imperiismo kaj la revivigo de la japana militarismo fare de la usonaj kaj japanaj reakciuloj, firme subteni la palestinan kaj aliajn arabajn popolojn en ilia batalo kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝiaj kunuloj kaj lakeoj, firme subteni la afrikajn popolojn en ilia batalo kontraŭ koloniismo kaj rasa diskriminacio, firme subteni la usonan popolon en ĝia revolucia batalo kaj firme subteni la popolojn de diversaj landoj en Azio, Afriko, Latinameriko, Oceanio, norda Ameriko kaj Eŭropo en ilia justa batalo. Ni devas plue plifortigi la batalan unuiĝon kun la veraj marksism-leninismaj partioj kaj organizoj de la tuta mondo, plue plifortigi la batalan unuiĝon kun la proletaro, la subpremataj popoloj kaj subpremataj nacioj de la tuta mondo kaj konduki la batalon kontraŭ imperiismo, reviziismo kaj reakciularo ĝis la fino!

Ni devas renkonti la kunvokon de la Kvara Tutlanda Kongreso de Popolaj Re- prezentantoj per novaj venkoj en ĉiuj frontoj!

Sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio kun la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kiel la estro, la popolanoj de ĉiuj naciecoj de la tuta lando alte tenu la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso kaj **unuiĝu por akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn**.

Vivu la granda Ĉina Popola Respubliko!

Vivu la granda, glora kaj ĝusta Komunista Partio de Ĉinio!

Vivu la granda Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso!

Vivu, vivu, longe vivu la granda gvidanto Prezidanto Maŭ!

Gaja Nacia Festotago

LA ruĝa suno leviĝas el la oriento, la brilo de Maŭzedongpenso sune prilumas la vastan teron.

Nia socialisma patrolando fondita de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ jam venke trapasis 21 brilajn jarojn!

Je la tagiĝo de la 1-a de oktobro, laboristoj, malriĉkamaranoj, malsuperaj mezkamaranoj, ĈPLA-anoj, milicianoj, ruĝgvardianoj, revoluciaj kadroj kaj revoluciaj intelektuloj de nia ĉefurbo kun festa ĝojo torentis de ĉiuj direktoj al Tian-anmen-placo, alte tenante ruĝajn flagojn. Ili venis tien por ricevi


Popolanoj kaj armeanoj de la ĉefurbo varme celebras la 21-an datrevenon de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko.



revuon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kun elstaraj atingoj en viva studo kaj viva apliko de Maŭ-zedongpenso, gigantaj fruktoj en la batalo, kritiko kaj reformo de la Granda Proletara Kultura Revolucio, grandaj sukcesoj en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, kaj kun la firma volo efektivi la spiriton de la Dua Plena Sesio de la Naŭa Centra Komitato de la Partio.

Je la deka horo antaŭtagmeze, nia plej estimata kaj amata granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima kunbatalanto Vicprezidanto Lin ascendis Tian-anmen-pordegon en la majesta muziko *Ruĝas la Oriento* por ĝoje celebri la unuan Nacian Festotagon de la sepdekaj jaroj kune kun armeanoj kaj popolanoj de la ĉefurbo.

“Vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ!”



“Longan vivon, longan longan vivon al Prezidanto Maŭ!”

La ĝojkrioj sonis tra la ĉielo. Tian-anmen-placo bolis de ĝojo! Ekkantis la montoj kaj riveroj de la patrolando!

Kun ruĝe radianta vizaĝo, vigla spirito kaj tre brila saneco Prezidanto Maŭ intime salutis la amasojn per mansvingoj. Prezidanto Maŭ ĉiam ligiĝas kun la amasoj koro kun koro!

Prezidanto Maŭ, ho Prezidanto Maŭ! Dank' al via brila penso, ĉiam pli prosperas nia granda patrolando, senkompare potencas nia granda partio, kaj estas senrivala nia granda armeo!

En la nomo de Prezidanto Maŭ, la Centra Komitato de la Partio kaj la Ĉina Registaro, Vicprezidanto Lin faris gravan paroladon, kiu ricevis akلامojn de la revoluciaj amasoj de tempo al tempo.

La ruĝa kvinstela flago flirtis en vento, kaj la paradantaj vicaroj brave tramarŝis Tian-anmen-placon!

La falango el centoj da armitaj ĈPLA-anoj takte almarŝis eskortante la majestan ruĝan kvinstelan flagon. Ili laŭte kriis la solenan sloganon “**Unuiĝu por akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn**” kaj montris la firman decidon de la komandantoj kaj batalantoj de ĈPLA por singardeme defendi nian grandan patrolandon.

Alia heroa trupo alvenis, alte tenante 2,000 ruĝajn flagojn kaj eskortante skulptan statuon de Prezidanto Maŭ svinganta la manon. “Kiam la granda gvidanto Prezidanto Maŭ svingas la manon, ni brave marŝas antaŭen!” De Ginggang-montaro ĝis Jan-an kaj de Jan-an ĝis Pekino, sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj rekta komando de Vicprezidanto Lin, tiu heroa trupo senrivale akiris unu venkon post alia en la pasintaj kelkdek jaroj. Hodiaŭ ĝi refoje ricevis revuon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin, firme decidis pli bone vive studi kaj vive apliki la grandan teorion pri daŭra revolucio sub la proletara diktaturo, **esti modesta kaj singardema, ne aroganta nek malpacienca**, konstrui la roton laŭ la rezolucioj de Gutian-kunveno kaj la Plivastigita Kunveno de Komisiono pri Militaj Aferoj de CK de KPĈ okazigita en la jaro 1960 kaj fari novajn meritojn por la popolo, prenante la akiritajn venkojn kiel novan startpunkton por konstruado de la roto.

La gigantaj modeloj de la ruĝa trezora libro en 4 volumoj brilis en la ora sunlumo. Sur bele orna-

mita kamiono kun la granda modelo de ruĝa flago, grupoj de personoj estis vivece prezentantaj emociajn scenojn de studo kaj apliko de filozofio fare de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. La paradantoj esprimis antaŭ Tian-anmen-pordego al Prezidanto Maŭ: Ni nepre reformos memkonscie tiel nian subjektivan mondon kiel la objektivan, aplikante vian brilan filozofian penson.

Inter la imponaj kaj majestaj vicaroj de la ĉefurba milico estis ankaŭ bravaj milicianoj plene armitaj. Milicianino Dong Hujlan, kiu venis el la regiono de Jimeng-montaro kaj partoprenis la solenon sur altano kun senkompara emocio kaj ekscitiĝo, pensis en si, ke la malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj kaj milicianoj de la tuta vilaĝo, kiuj akompanis ŝin ĝis la ŝoseo ĉe ŝia ekvojaĝo, multfoje komisiis ŝin prezenti al Prezidanto Maŭ la garantion: “Ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj nepre observos vian grandan instruon **‘sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo’**, rikoltos multe da greno kaj bone ekzercos nin por lerte batali kontraŭ malamikoj. Se la malamikoj aŭdacos nin agresi, ĉiu colo de la tero de nia patrolando estos loko por ilin entombigi.”

Kiam la ĉiamvenka Maŭzedongpenso estas posedata de la vastaj amasoj, ĝi fariĝas neelĉerpebla forto. La bele ornamitaj kamionoj kaj gigantaj sloganoj inter la paradantaj laboristoj, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la ĉefurbo manifestis ties grandajn sukcesojn atingitajn sub la kuraĝigo de la granda alvoko de Prezidanto Maŭ **“teni la revolucion, stimuli la produkton”** kaj montris ke nova alta tajdo de socialisma revolucio kaj socialisma konstruado leviĝas sur la vasta tero de nia patrolando.

Sur iu bele ornamita kamiono staris modelo de grandtipa kristaltira maŝino, kiun projektis kaj fabrikis ĉefurbaj laboristoj. Ĉiuj elektronaj laboristoj en la paradantaj vicaroj grandpaŝe alvenis alte tenante brilantajn modelojn de solkristala silicio, kio montris la grandan frukton de amasa entrepreno de elektrona industrio.

La kvin ore brilaj vortoj **“lerni de Daĝaj en agrikulturo”** kondukas la kvincentmilionan kampararon marŝi antaŭen! Sur altano la 73-jara malriĉkamparano Guo Dingjuan el Kinghaj-altebenejo emocie rigardis supren al Prezidanto Maŭ kaj ekpensis la vortojn, kiujn diris al li dum la ekvojaĝo la pli ol 1,000 diversnaciecaj komunumanoj hanaj, tibetaj, hujaj, tuaj, salaaj kaj aliaj: “Ni deziru

longan vivon al Prezidanto Maŭ, la granda gvidanto de nia diversnacieca popolo!” Kiel li deziris persone raporti al Prezidanto Maŭ: Pro via granda alvoko **“lerni de Daĝaj en agrikulturo”**, nia malvarma regiono alta je pli ol 2,000 m. super la marnivelo jam akiris riĉan rikolton de greno en 5 sinsekvaj jaroj, kaj ĝia pomua produkto jam superis 700 ĝinojn en la lasta jaro.


Jen venis alia paradanta trupo vigloplene ĉirkaŭanta bele ornamitan kamionon kun granda slogano **“Batalu por fondi socialismajn universitatojn”**. Ili estas la unua generacio de studentoj, de niaj novaj socialismaj universitatoj devenintaj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj! Ili ĵus venis de fabrikoj, kamparoj kaj kazernoj al la ĉefurbo, ilia emocio ankoraŭ ne kvietiĝis, kaj hodiaŭ ili sentis senliman feliĉon kaj senkomparan fieron estante revuataj de Prezidanto Maŭ. Ili varme akklamis la grandan venkon de la proletara eduka linio de Prezidanto Maŭ! Ili havas firman decidemon por studi en universitato kaj administri kaj reformi ĝin per Maŭzedongpenso.

Alia bele ornamita kamiono kun modelo de torĉo eniris malrapide Tian-anmen-placon en majesta muziko de la kanto *Certe Venkos la Tutmondaj Popoloj*. Ho, ruĝa torĉo, via apero rememorigis al ni la “fajrerojn” sur Ginggang-montaro kaj la bataladon, dum kiu la ĉina popolo al militis la regpotencon per pafiloj. Ho, ruĝa torĉo! vi simbolas la flamantan revolucion fajron sur la tuta terglobo, vi simbolas ke **“nun la ĉefa tendenco de la mondo estas revolucio”**.

La batalvicaroj marŝas antaŭen, la torĉo disvas-tigas ĉien bruladon, la solena alvoko **“Popoloj de la tuta mondo, unuiĝu kaj venku la usonajn agresantojn kaj ĉiujn iliajn lakeojn!”** stimulas la ĉinan popolon kaj la mondajn popolojn en ilia heroa batalo!

En la festa nokto, pompe brilis lamplumoj sur Tian-anmen-placo. Kiam nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima kunbatalanto Vicprezidanto Lin ascendis Tian-anmen-pordegon, tien turniĝis miloj kaj dekmiloj da okulparoj, kaj miloj kaj dekmiloj da ruĝaj koroj sin klinis al Prezidanto Maŭ. Diverskoloraj artefajraĵoj arope kaj arope leviĝis alte super la placo. La tuta placo estis plena de bolanta ĝojo.

Tian-anmen-pordego similas al granda ŝipo sur la gaja maro, kaj la granda stiristo Prezidanto Maŭ firme staras sur ĝia pruo kaj direktas nin antaŭen-marŝi en vento kaj ondoj al la brila estonteco!



Kun revolucia patoso la diversnaciecaj popoloj de nia lando firme decidis strikte unuigi ĉirkaŭ la Centra Komitato de la Partio kun Prezidanto Maŭ kiel la estro kaj Viceprezidanto Lin kiel la vicesstro por daŭre plenumi la batalajn taskojn de la Naŭa Kongreso de la Partio kaj akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn.

Realiĝis la Deziro de Laboristoj, Kampanoj kaj Soldatoj

SUB la kora prizorgo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, en la movado de batalo, kritiko kaj reformo de la Granda Proletara Kultura Revolucio, laboristaj, kampanoj kaj soldataj studentoj, kiuj estis elektitaj de centoj da milionoj da laboristoj, kampanoj kaj soldatoj, en vigla spirito kaj kun levita kapo marŝis en la novajn socialismajn altlernejojn Kinghua-universitaton kaj la Pekinan Universitaton.

“La inversigita historio estis reinversigita, kaj fine realiĝis nia deziro!” Kun profunda proletara amo al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, centoj da milionoj da laboristoj, kampanoj kaj soldatoj varme aklamas la grandan venkon de la ĉiamvenka Maŭzedongpenso!

IRI LA VOJON DE KONTRAŬJAPANA MILITA KAJ POLITIKA UNIVERSITATO MONTRITAN DE PREZIDANTO MAŬ

Estis frua mateno de la 27-a de aŭgusto de 1970. La ruĝa suno leviĝis de la oriento kaj la grandioza kaj impona Tian-anmen-placo estis baniĝanta en la briloj de la suno. Alte tenante la ruĝan trezoran libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj kun senlime profunda amo rigardante la brilan portreton de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ sur la mura mezo de Tian-anmen-pordego, la laboristaj, kampanoj kaj soldataj studentoj staris en vicoj sur la placo kaj solene ĵuris:

Ho, Prezidanto Maŭ, Prezidanto Maŭ! Ni 221 laboristoj, kampanoj kaj soldatoj de la bordoj de Hajhe-rivero venis por lerni en altlernejoj ĉe vi. Tio estas la plej granda feliĉo, kiun vi donis al ni. Ni certe gajnos gloron por vi kaj por la granda socialisma patrolando! Ni studentoj el laboristoj, kampanoj kaj soldatoj ne superstiĉe kredas ĉian ajn “aŭtoritatulon” de la burĝaro. Ni kuraĝas revolucii, kuraĝas krei novon kaj decidis iri la vojon de

la Kontraŭjapana Milita kaj Politika Universitato kaj esti revoluciuloj. Ni lernas ne por renomo nek por profito. Ni decidis agi jene: Kvankam nia posteno ŝanĝiĝis, tamen neniam ŝanĝiĝos nia memkonscio pri daŭra revolucio; kvankam la medio ŝanĝiĝis, tamen neniam ŝanĝiĝos nia naturo de laboranta popolo; kvankam nia tasko ŝanĝiĝis, tamen neniam ŝanĝiĝos nia stilo de penema lukto en malfaciloj! Ĉio povas ŝanĝiĝi, sed neniam ŝanĝiĝos nia ruĝa koro fidela al vi!

La laboristaj, kampanoj kaj soldataj studentoj, kiuj venis al Pekino de diversaj partoj de la lando, ĉiuj, same kiel siaj kunbatalantoj de la “Longmarŝa Taĉmento” de Tiangin, decidis por ĉiam iri la vojon de la Kontraŭjapana Milita kaj Politika Universitato. Venante al la altlernejoj, iuj el ili portis kun si ŝpatojn aŭ sarkilojn, aliaj falĉilojn kaj triaj harfondilojn kaj kudrilujojn. Ili alportis la gloran tradicion de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj la revolucionan spiriton de la laboranta popolo pri penema lukto en malfaciloj.

HEREDI LA GLORAN REVOLUCIAN TRADICION

Zoŭ Ĉenghiang, malriĉkampanino-komunumano de Daging-brigado de Gिंगgangŝan-komunumo, tre emociiĝas ĉiufoje, kiam ŝi rememoras pri la sceno de sia adiaŭo al Gिंगgang-montaro por veni al Pekino.

Jam estis profunda nokto. La familio de Ĉenghiang ankoraŭ sidis runde antaŭ la portreto de Prezidanto Maŭ. Kun senlima malamo al la malnova socio kaj senlima amo al la nova socio, ŝia patro ankoraŭfoje rakontis pri la mizerplena familia historio kaj la liberiĝo de ilia familio. Por sendi sian filinon al altlernejo lerni apud Prezidanto Maŭ, la patro speciale donis al ŝi kvar karajn donacojn ekzempleron de verkoj de Prezidanto Maŭ, libre-

Maljuna laboristo faras klasan edukon al la laboristoj tuj vizitontaj universitaton kaj admonas ilin lerni por la revolucio.



ton pri la revolucia familia historio, du parojn da sandaloj kaj saketon da ruĝrizo ofte mangata siatempe de la Ruĝa Armeo. Ĉenĝiang transprenis per ambaŭ manoj la revoluciajn trezorajn heredaĵojn kaj maldormis tra la nokto pro emociiĝo.

Ĉe ekiro de Ĉenĝiang la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la tuta vilaĝo venis por adiaŭi ŝin. Ŝia avo Zoŭ Venkaj, estro de ribela taĉmento de la tiama Ruĝa Armeo, gvidis ŝin ankoraŭfoje rigardi la iaman loĝejon de Prezidanto Maŭ en Daging, por ke ŝi gravuru en la koro la gloran historion de la ginggang-montara popolo, kiu faris revolucion sub la gvido de Prezidanto Maŭ. Multaj maljunaj malriĉkamparanoj, prenante la manojn de Ĉenĝiang, kore diris sian esperon: Vi estas malriĉkamparanino studentino elektita de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de nia Ginggang-montaro laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, vi nepre ne devas vanigi la esperon kaj prizorgon de Prezidanto Maŭ al nia ginggang-montara popolo! Nepre multe krii por ni "Vivu Prezidanto Maŭ!", kiam vi estos atinginta Pekinon kaj vidinta Prezidanton Maŭ!

Inter la laboristaj, kamparanaj kaj soldataj studentoj, kiuj eniris la novajn socialismajn altlernejojn kune kun la gefiloj de la ginggang-montara

popolo, estas batalanto de ĈPLA Liu Gijing, frato de heroino Liu Hulan. Li skribis leteron al sia familio kun senkompara emocio, de tempo al tempo fiksrigardante la ruĝan saketon antaŭ si kaj la kvar liniojn de oraj ĉinaj ideografiaĵoj broditaj sur la saketo. Ondiĝis lia koro, kaj antaŭ liaj okuloj aperis la sceno, kiel lia patrino adiaŭis lin por lia aliĝo al ĈPLA.

Antaŭ tri jaroj, kiam la peto de Liu Gijing por armeaniĝo estis aprobita, lia patrino venis al la loko, kie la martirino Liu Hulan heroe oferis sian vivon, prenis plenmanon da tero, metis ĝin en ruĝan saketon kaj brodis sur ĝi kudron post kudrero jenajn vortojn: "Firme memoru la klasan suferon, neniam forgesu la venĝon de sango kaj larmoj, daŭrigu la idealon de la fratino kaj ĉiam estu revoluciulo!" En la mateno, kiam Liu Gijing devis ekiri al armeo, la patrino lin vokis antaŭ sin kaj diris intime: "Kna-bo, portu tiun ĉi saketon. Havante ĝin ĉe vi, vi kvazaŭ ĉiam estus kun via fratino. Vi nepre devas, same kiel via fratino, por ĉiam aŭskulti vortojn de Prezidanto Maŭ kaj esti lia bona batalanto!" Kun larmoj en la okuloj Liu Gijing transprenis la ruĝan saketon, venis antaŭ la tombon de la martirino Liu Hulan kaj faris tie solenan ĵuron antaŭ sia rekrutiĝo.

La “vivo granda kaj morto glora” de la martirino ĉiam stimulas Liu Gijing en lia grandpaŝa antaŭenmarŝo sur la larĝa vojo de ideologia revoluciigo. En la trupo — granda lernejo de Maŭzedongpenso, li plurfoje estis elektita kiel batalanto kun kvin bonoj kaj aktivulo de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso, kaj estis glorie akceptita en la grandan Komunistan Partion de Ĉinio. Kun profunda proletara sento de senlima fidelo al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ li diris: “Veninte de la trupo en la altlernejon, mi devas ĉiam teni pafilon en mia penso, neniam forgesi la klasan batalon kaj dediĉi mian forton por bone funkciigi novtipan socialisman altlernejon!”

FIRME TENI LA REGPOTENCON DE LA PROLETARO SUPER LA EDUKADO

Sun Deju, komunisto kaj veterana laboristo veninta de karbominejo de la Hulunber-ligo, ĉiam emociiĝis ĝis larmoj je mencio pri tio, ke li hodiaŭ povas veni apud Prezidanton Maŭ por lerni en la altlernejo.

En la malnova socio, la familio de Sun Deju de generacio al generacio laboris kiel ministoj, kaj neniu el liaj familianoj estis legoscia. Li neniam forgesos pri tio, ke kiam li estis naŭjara, lia patrino mortis de la turmento en la malnova socio pro manko de mono por kuraci ŝian malsanon, lia kelkvara fratino devigite fariĝis infan-fianĉino en alies hejmo kaj li mem estis devigita laboregi kiel infan-laborulo por kapitalisto pro ŝuldo. Li neniam forgesos, kiel la lupa kapitalisto vundis lin per hakilo je la brako kiu ĝis nun ne povas rektiĝi; li neniam forgesos, kiel la edzino de la kapitalisto per tranĉilo kruele enpikis lian ventron nur pro lia neatenta rompo de fajenca vazo, de kio li tuj svenis kaj falis teren kaj ke ĝis nun li havas cikatron. Post veno en Kinghua-universitaton, li diris emocie kun larmoj: “En la malnova socio ni laboristoj estis premitaj de imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo ĉe la plej malsupra socitavolo, vivis kvazaŭ en infero, rompiĝis niaj ostoj pro devigita laborego, kiel ni povis havigis al ni tiutempe la rajton lerni en altlernejo! Antaŭ la granda kultura revolucio, la malnovaj altlernejoj, kiuj antaŭenpuŝis la kontraŭ-



Instruisto kaj studentoj de la Pekina Universitato kune lernas per diskutado.

revolucionian reviziisman edukan linion de Liu Ŝaŭki, tenis kiel antaŭe nin laboristojn ekster la altlernejaj pordegoj. Mi neniam forgesos pri tio, ke nur dank' al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kiu donis al mi la rajton, mi povas lerni hodiaŭ en la altlernejo!"

Kiam alvenis la informo, ke Kinghua-universitato elektos en Daĝaj studenton, tuj ekbolis la tuta Daĝaj-brigado! Tra la intermontoj kaj kampoj sonoris la ĝojkrioj: "Vivu la granda, glora kaj ĝusta Komunista Partio de Ĉinio!" "Vivu, longe vivu la granda gvidanto Prezidanto Maŭ!" La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Daĝaj diris: "Kiu el la maljuna generacio de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de nia Daĝaj ne estis analfabeto! Post la Liberiĝo, ni emancipiĝis en politiko kaj ekonomio. Tamen, rezulte de la kontraŭrevolucia reviziisma linio antaŭenpuŝita de Liu Ŝaŭki, ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ankoraŭ ne havis la ŝancon lerni en altlernejoj. Hodiaŭ, Prezidanto Maŭ donis al ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj rajton kaj ŝancon veni apud lin nian amatan por lerni en altlernejoj, tio estas la plej granda zorgo kaj plej granda kuraĝiĝo de Prezidanto Maŭ al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la tuta lando!"

Sub la gvido de la partia filio de Daĝaj-brigado, ĉiuj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj rememoris pri sia vilaĝa historio kaj la historio de la batalo inter la du linioj sur la eduka fronto kaj disvolvis revolucionan amasan kritikadon. Post multfoja interkonsiliĝo kaj ripetada diskutado de la amasoj en kaj ekster la partia organizo, ili unuvoĉe elektis Ĝaŭ Suheng, komitatanon de la partia filio kaj malriĉkamparanon spertplenan en praktiko, por sendi lin lerni en la akvoutiliga fakultato de Kinghua-universitato. En la tago de lia foriro, tra la tuta vilaĝo oni tamtamis kaj tamburis kaj okazis adiaŭa mitingo. Kun la grava misio al li konfidita de ĉiuj komunistoj, malriĉkamparanoj



Studentoj de la fakultato de civila inĝenierado de Kinghua-universitato studas konstruan projekton kune kun laboristoj-majstroj en iu konstruejo.

kaj malsuperaj mezkamparanoj de Daĝaj, Ĝaŭ Suheng decidis, kune kun studentoj el laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj de diversaj lokoj, bone lerni en la altlernejoj, kaj bone funkciigi kaj bone remuldi la altlernejojn per Maŭzedongpenso!

FIRME TENI LA PAFILON KAJ PLUMON POR LA REVOLUCIO

Frumatene, sur roka klifo ĉe fronta mardefenda posteno, batalanto de ĈPLA estis gardanta la maran teritorion de la patrolando, firme tenante sian pafilon. Li estis batalanto de iu trupo de la Nordmara Floto Li Kingfa, kiu tuj ekiros al Pekino por lerni en altlernejo apud Prezidanto Maŭ. En tiu momento, plena de revolucia patoso li estis plenumanta sian lastan gardstaran deĵoron por la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

Kunbatalanto venis por anstataŭi lin. Ili kune studis la grandan instruon de Prezidanto Maŭ "al-

tigi singardemon, defendi la patrolandon". La kunbatalanto varme kuraĝigis Li Kingfa, dirante: "La Partio kaj Prezidanto Maŭ transsendas vin de la batala posteno de defendo de la patrio al lernejo. La ekpreno de plumo anstataŭ pafilo signifas transiron de unu batalfronto al alia batalfronto. Post via eniro en Kinghua-universitaton vi nepre daŭre gardstaru, gvatu kaj batalu bone por Prezidanto Maŭ!" La sincera espero de la kunbatalanto plifirmigis la decidemon de Li Kingfa bone lerni en la altlernejo. Li respondis: "Vicprezidanto Lin montris al ni, ke 'kapto de la regpotenco dependas de la du armiloj — plumo kaj pafilo, kaj ankaŭ firmigo de la regpotenco dependas de tiuj du armiloj'. Ni kune batalu por defendi la revolucion linion de Prezidanto Maŭ sur la malsamaj postenoj!"

Al konstruejo de la trupo, en kiu estis la granda komunisma batalanto Lej Feng, speciale alvenis maljuna trupestro por vidi batalanton Liu Hjue kaj korverŝe interparolis kun li. La estro konsilis kore, ke Liu Hjue antaŭ ĉio firme tenu la radikan aferon kaj konstante studu la "tri popularajn artikolojn" dum sia lernado en la altlernejo.

Post sia alveno en la Pekinan Universitaton Liu Hjue ĉie prenas Lej Feng kiel ekzemplon. Li diris: "Mi nepre diligente lernos por la ĉina revolucio kaj la monda revolucio kaj forĝos ruĝan koron por firmigo de la proletara diktaturo."

ĜISFUNDE KRITIKI LA KONTRAŬREVOLUCIAN REVIZIISMAN EDUKAN LINION

La laboristaj, kamparanaj kaj soldataj studentoj profunde komprenas el siaj propraj travivaĵoj, ke por ĝisfunde remuldi la malnovajn altlernejojn kaj bone funkciigi la novajn socialismajn altlernejojn, estas nepre necese profunde kaj longdaŭre disvolvi revolucion amasan kritikadon, por komplete likvidi la restantan venenan influon de la kontraŭrevolucia reviziisma eduka linio de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki. Pri tio, precipe profundan komprenon el sia sperto havas la demobilizitaj armeanoj Hiang Juenan, Ĝang Daŭmi, Ĝang Ŝuting kaj aliaj tri kamaradoj.

Antaŭ dek jaroj, Hiang Juenan kaj la aliaj kvin kamaradoj kune kun aliaj kunbatalantoj estis rekomenditaj de la trupoj eniri altlernejojn. Sed sub la rego de la kontraŭrevolucia reviziisma eduka linio,

la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj burĝaraj reakciaj "aŭtoritatuloj" forpuŝis la laboristajn, kamparanajn kaj soldatajn studentojn kalumniante ilin kiel "homojn de modesta cerbo", kaj elpelis ilin unun post alia el la altlernejoj per diversaj insidemaj rimedoj. Kvankam Hiang Juenan kaj la aliaj kvin kamaradoj faris firman batalon kontraŭ ili, tamen sub la premo de la kontraŭrevolucia reviziisma linio, ili devis forlasi la lernejojn kun forta indigno same kiel aliaj persekutataj laboristaj, kamparanaj kaj soldataj studentoj.

Post kiam alvenis la novaĵo pri elektado de studentoj el laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj fare de Kinghua-universitato kaj la Pekina Universitato, la kamaradoj de la Pekina Financa Buroo ĉiuj unuvoĉe konsentis sendi Hiang Juenan kaj la aliajn kvin kamaradojn lerni denove en altlernejoj. En la adiaŭa kunveno, kun senlima amo al Prezidanto Maŭ kaj senlima malamo al Liu Ŝaŭki, Hiang Juenan parolis en la nomo de li mem kaj la aliaj kvin kamaradoj: "Antaŭ dek jaroj, ni estis puŝitaj el altlernejoj; hodiaŭ ni estas senditaj en la novtipajn socialismajn altlernejojn. En tiu elpuŝo kaj tiu ensendo profunde speguliĝas la intensa batalo inter la du klasoj kaj inter la du linioj sur la eduka fronto. Ni nepre restos por ĉiam fidelaj al Prezidanto Maŭ, mortospite defendos la revolucion linion de Prezidanto Maŭ kaj batalos dum la tuta vivo por firmigi la proletaran diktaturon!"

Post kiam la studentoj el laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj de diversaj lokoj venis en la lernejojn, ili tuj malfermis batalejojn de revolucia amasa kritikado en lernejoj ĝardenoj, klasĉambroj kaj litĉambroj. Ili diris, ke nur se oni daŭre kaj profunde disvolvas revolucion amasan kritikadon, oni povas komplete likvidi la restantan venenan influon de la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Liu Ŝaŭki kaj konduki la revolucion sur la eduka fronto ĝis la fino.

POR ĈIAM IRI LA VOJON DE KOMBINIĜO KUN LABORISTOJ, KAMPARANOJ KAJ SOLDATOJ

Kune kun laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj venis al Pekino por lerni en la altlernejoj ankaŭ multaj intelektaj gejunuloj, kiuj fiksloĝiĝis kaj partoprenis produktan laboron en la kamparo. Ili estas harditaj sur la plejfronto de la tri grandaj revoluciaj movadoj kaj ĝuis varman bonvenigon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Tiel ili estis aprobitaj kaj rekomenditaj de la lastaj por lernado en altlernejoj.



Studentoj muntas radian aparaton sub direktado de la laboristo-majstro.

Nokton de la 17-a de aŭgusto de 1970 okazis ceremonio de akcepto de novaj kompartianoj en la oficejo de Ŝangĉun-produktgrupo de Fanda-brigado, Hajnan-insulo, kie koncentriĝe loĝas Li-nacianoj. 21-jara nova partiano Li Kiongmej, kiu estis tuj ekironta al Pekino por lerni tie en altlernejo, staris antaŭ la portreto de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj faris solenan ĵuron. Ŝi diris emocie: “La patrino min naskis, la Partio min elkulturis, la ĉiam-venka Maŭzedongpenso min direktas en mia antaŭenmarŝo kaj la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj donas al mi reedukon. Mi certe metos min sub la dispo de la Partio kaj ĵuras batali por komunismo dum la tuta vivo!”

Antaŭ tri jaroj, sekvante la grandan instruon de Prezidanto Maŭ “**la intelektaj gejunuloj kaj junaj lernantoj nepre devas kombiniĝi kun la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj**”, Li Kiongmej ŝultroportante pakajon transgrimpis montojn kaj travadis riverojn kaj venis al Ŝangĉun-produktgrupo por tie fiksloĝiĝi kaj partopreni produktan laboron. Dum la tri jaroj, ŝi manĝis, vivis, lernis kaj laboris kune kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Li-nacio kaj starigis kun ili profundan klasan amikecon. Ĉifoje, kiam Kinghua-universitato elektis novajn studentojn, ĉiuj unuanime rekomendis ŝin al Pekino por lernado en la altlernejo.

La intelektaj gejunuloj, kiuj venis de diversaj lokoj de la patrio al Pekino por lerni en altlernejoj, alportis kun si multajn karajn donacojn donitajn de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Inter tiuj donacoj estas verkoj de Prezidanto Maŭ, litkovrilo uzita de tri generacioj de familio, olea lampo sub kiu malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kune kun ili studis verkojn de Prezidanto Maŭ, kudrilujoj propramane kudritaj de malriĉkamparaninoj onkloroj... La sincera espero de la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj al ili ĉiam kuraĝigas ilin remuldi sian mondkoncepton per Maŭzedongpenso kaj diligente lerni por la revolucio, inspiras ilin por ĉiam iri la vojon de sinkombino kun laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj kulturi sin en novajn proletarajn intelektulojn.

Nun, sub la kuraĝigo de la Komunikado de la Dua Plena Sesio de la Naŭa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj sub la gvido de la laboristaj kaj ĈPLA-aj propagandaj taĉmentoj de Maŭzedongpenso laborantaj en la lernejoj kaj la universitataj partiaj komitatoj, kun heroa nobla volo ke “**Ĉinio devas fari relative grandan kontribuon al la homaro**”, la studentoj el laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj en Kinghua-universitato kaj la Pekina Universitato pli diligente vive studas kaj vive aplikas Maŭzedongpenson kaj batalas por bone funkciigi la novtipajn socialismajn altlernejojn!

La Liberĉiela

Karbominejo

Hongvej

HONGMEJ kaj ALAN



ANTAŬNELONGE, ni vizitis la liberĉielan karbominejon Hongvej de Fuŝun, Liaŭning-provinco, kiun ni forlasis antaŭ pli ol dudek jaroj.


Ni venis en la akceptejon de la minejo kaj diris nian intencon al la deĵoranto. Tiam nin varme akceptis laboranto de la revolucia komitato kamarado Lju Hinke, maljuna ministro kiu feliĉe vidis tie la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ antaŭ 12 jaroj. Unue li gvidis nin pririgardi la gigantan pelvoforman minfosajon.

En la komenca periodo post la Liberiĝo, tie estis nur longa mallarĝa fosajo. Sed nun, antaŭ niaj okuloj estas eksterordinare grandioza karba ravino pli ol dek liojn longa de la orienta ekstremo ĝis la okcidenta. La spirala vojo en ruĝa, flava, verda, bruna kaj nigra koloroj iras supren ŝtupon post ŝtupo al la ĉielo; la homoj vidiĝas kiel mal-

grandaj punktoj kaj la trajnoj aspektas kiel moviĝantaj linioj. En la lumo de la matena suno, la vasta karbominejo estas kvazaŭ kovrita de nigra vualo.

La liberĉiela karbominejo Hongvej jam havas historion kun pli ol 50 jaroj de ekspluatado. Ĝi enhavas eksterordinare dikajn tavolojn de karbo kaj krome ankaŭ abundan riĉaĵon de oleskisto, kiu estas materialo por artefarita petrolo. Ekde la fondiĝo de la minejo en 1914, dum 34 jaroj la japana imperiismo kaj la kuomintanga reakciularo ĝin tenadis unu post la alia en siaj manoj. En la tagoj proksimaj al la Liberiĝo, ĝi preskaŭ fariĝis kota lago.

Ni demandis, kiel la malnova minejo akiris novan vivon. Ĉirkaŭmontrante al la giganta kavego, kamarado Lju Hinke emociite diris al ni, ke post kiam revenis en la manojn de la popolo



Jen estas la Liberĉiela Karbominejo Hongvej.

la malnova minejo, kiun la japanaj agresantoj kaj la kuomintanga reaktiularo terure difektis, la vastaj amasoj de ministoj pene luktis en malfaciloj sin apogante sur propraj fortoj sub la direktado de Maŭzedongpenso, kaj rekomencis ĝian produktadon post nur unu jaro; en la periodo de la Unua Kvinjara Plano, mekanikigo kaj aŭtomatigo jam tute efektiviĝis en la produktaj procedoj, kiuj postulis pezan fizikan laboron en la pasinteco; en la jaro 1958, la granda gvidanto Prezidanto Maŭ venis al la minejo por inspekto kun kora zorgo kaj la ministoj ĉiuj estis forte stimilitaj. Ili energie faris teknikan renovigon kaj teknikan revolucion kun granda entuziasmo kaj alta batalvolo, alte tenante la brilan standardon de la ĝenerala linio **“streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie”**, por renovigi la fizionomion de la malnova minejo, kaj kreis bonegajn atingojn

por danki la koran zorgon de nia amata Prezidanto Maŭ. En tiu jaro, plej altaj rekordoj post la fondiĝo de la minejo estis kreitaj en la produkto de karbo kaj forigo de la kovranta tertavolo; kaj poste, la Dua Kvinjara Plano estis plenumita je du jaroj antaŭ la fiksita dato. Se oni stariĝus muron je 1 metro larĝan kaj je 1 metro altan el la teraĵo kaj ŝtonoj fositaj por restarigi kaj konstrui la minejon en la pasintaj pli ol 20 jaroj, tiu muro povus ĉirkaŭi la terglobon je pli ol dek fojoj.

Tagmeze, ni descendis en la kavegon per kablovagono, kiun la ministoj uzas por supren- aŭ malsupren-iri la kavegon. Kiam ni atingis la fundon je pli ol 200 metroj sub la tersurfaco, ni trovis, ke ni vere estas en maro de karbo. Sur la brile nigraj karbofosejoj, brue laboras boriloj kaj elektraj fosmaŝinoj, kuras elektraj lokomo-

tivoj kaj vigle funkcias ŝarĝokaĝoj. Kiom da karbo estas transportata ĉiutage kaj ĉiunokte de la minejo al diversaj lokoj de la patrio! Kamarado Lju Hinke diris, ke post la Liberiĝo tiu minejo ĉiujare superplenumis la ŝtatan planon, kaj precipe post la fondo de la revolucia komitato, ĝi plenumis la karbo-produktan jaran planon je 40 tagoj antaŭdate; en la unua duono de la kuranta jaro, ĝia produktokvanto salte kreskis je 32.7% kompare kun tiu de la sama periodo de la pasinta jaro kaj ĝi plenumis la produktan taskon je 43 tagoj antaŭ la fiksita dato.

Promenante en la karbomaro, ni profunde tuŝiĝis en la koro. Kiam ni vidis la senobstrukcan unuigitan minkavegon kaj la netan larĝan spiralan vojon, reaperis en nia cerbo kiel lumbildoj la pasintaj tragikaj kaj dezertaj vidaĵoj de la minejo: Dum sia regado, la japana imperismo kaj la kuomintanga reakciularo freneze rabis karbon laŭ la maniero buĉi kokinion por ricevi

ovojn kaj postlasis amasegojn da forportenda elfosita tero en la kavego. Tiam la kavego estis dividita en multajn partojn senordajn, malgrandaj kavoj aperis en la granda kaj la ŝtupoj de la spirala vojo disfalis je multaj lokoj. Kiam la japanaj agresantoj kapitulacis, ili diris arogante: "Post nia foriro, la kavego fariĝos nur fiŝbredejo!" Usona imperiisto A. C. Wedemeyer diris ekstravaganca: "La ĉinoj ne kapablas administri tiel grandan minejon"! Fakte, la senhonta kalumnio de la usonaj kaj japanaj reakciuloj jam kreviĝis kiel sapa veziko antaŭ la ĉina popolo!

Ni vidis ĉi tie la ofte priparolatan Grandan Spegulon. Dum la regado de la japana imperismo, foje okazis granda defalo de rokoj de sur la suda taluso, dividante la minkavegon en du partojn, kaj tio ne nur kovris grandan kvanton da karbo, sed ankaŭ malhelpis la regulan profundigon de la minkavo kaj plivastigon de la elfosado de karbo. La taluso post la defalo fariĝis krutega,

Parto de la liberĉiela karbominejo




spegule glata surfaco kun alteco de centoj da metroj, sur kiu povas kreski neniuj herboj. La vagonaroj devis retroiri de tiu loko kaj homoj devis ĝin ĉirkaŭiri. Oni nomis ĝin malpermesita loko aŭ Granda Spegulo. Hodiaŭ jam tute aliĝis ĝia aspekto, jam konstruiĝis sur ĝi ŝtupon sur ŝtupo la spirala vojo brile nigra kaj plene ŝarĝitaj karbo-trajnoj kuras navede tien reen. Kamarado Vang Lajking, respondeculo de tiu distrikto, diris al ni: Post sia fondo la revolucia komitato organizis ministojn en marto de la kuranta jaro komenci batalon kontraŭ la Granda Spegulo, por produkti pli multe da karbo por la ŝtato, laŭ la granda instruo de Prezidanto Maŭ **“sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo”**. Spite al frostega vento, la ministoj penlaboregis tage kaj nokte, borante truojn por dinamito, eksplodigante rokojn kaj elhakante vojojn. Estis neeble uzi aŭtomatan borilon sur la krutega ŝtona “spiegulo”. Komunisto Duan Liancaj, veterana laboristo de la eksplodiga grupo, kaj tri eksplodigistoj sub lia gvido boris truojn per ŝtalstangoj kaj martelegoj pendante de ŝnuregoj ĉirkaŭ la talio en la aero ĉe monta talio por fari eksplodigadon. La manoj de multaj homoj frotvundiĝis kaj sangis, sed ili ne plendis nek ĝemis de doloro, male ili laboris kun ĉiam pli grandaj entuziasmo kaj energio. La membroj de la 17-a elektrosila grupo tie laboranta kovriĝis tutkorpe de koto en somero kaj de glacio en vintro. Kun la revolucia spirito **“timi nek malfacilojn nek morton”**, la karboministoj tiamaniere venkis la diversajn malfacilojn en vetero kaj geologiaj kondiĉoj kaj malfermis, en malpli ol duonjaro, la malpermesitan lokon Granda Spegulo, kiu arogante staris jardekojn en la kavego. Nun, tiu loko povas produkti ĉiutage milojn da tunoj da karbo. Tiu produktokvanto egalas al tiu de mezgranda minejo.

Poste ni venis al la karboelekto sude de la kavego. Antaŭ la Liberiĝo, vintre ĝi similis al ventolilo kaj somere al vaporumilo. Kribriroj skuiĝadis, karbopulvoro disflugis kaj akvotrogoj por lavado ĉiam likadis. La karboelektistoj tutajn tagojn laboregis kiel ŝarĝobrutoj en la karcersimila laborejo pulvorplena kun akvo profunda ĝis la maleolo. Nun tie funkcias radiatoroj en vintro kaj ventoliloj en somero, la aero estas freŝa, la planko pura kaj novtipaj karboelektaj maŝinoj produktitaj de nia lando viciĝas en la laborejo. Jam tute malaperis la permanente manipolataj maŝinoj antaŭ la Liberiĝo, ĉe kiuj svarmis homoj. Tie

kamarado Lju Hinke alvenigis respondeculon por teknika reformo de la karboelekto kamaradon Ki Vejcaj por konigi al ni la staton.

Kamarado Ki Vejcaj laboris kiel karboelektisto en la karboelekto por pli ol 30 jaroj. En la antaŭlasta jaro, li veturis al Pekino por diskuti la tutlandan planon de karboprodukto kaj dum la kunveno feliĉe vidis la grandan gvidanton Prezidanton Maŭ. Reveninte al la minejo, li decidis propramane reformi la postrestantajn malnovajn ekipaĵojn por karboelektado. La revolucia komitato sankciis projekton de li elmetitan. Post dekoj da provoj faritaj de li kune kun siaj malnovaj kolegoj, fine estis sukcese renovigita karboelekta maŝino kun produktivo 1.5-oble pli alta ol tiu de la malnovtipa.

En la karboelekto, ĉie oni povas vidi reformon de malnovaj maŝinoj kaj muntadon de novaj ekipaĵoj. Kamarado Ki Vejcaj diris: “En la komenca periodo post la Liberiĝo, la ekipaĵoj postlasitaj de la japana imperiismo kaj la pupa reĝimo en la karboelekto estis unuspecaj kun maŝinoj malnovaj, la kapablo de karboelekto estis malalta kaj la nombro de dividitaj specoj de karbo estis malmulta. Post la Liberiĝo, dank’ al paŝpostpaŝa renovigo de la ekipaĵoj, multiĝis la dividitaj karbospecoj kaj duobliĝis la povo de karboelektado. Kaj dume, la laboristoj, kiuj elektis karbon per siaj manoj, nun ĉiuj laboras en plej modernaj karboelekto. Parolante, ni eniris nove konstruitan domon kun alteco de 7 etaĝoj, kiu estas laborejo por karboelektado per peza perilo ekfunkciigita en la Granda Proletara Kultura Revolucio. En la centra kontrola kabineto de tiu laborejo, ni intervidiĝis kun kamarado Meng Ĝaŭkuj, kiu fariĝis permana elektisto en la minejo je sia 14-jara aĝo, kaj sub la okupado de la japana imperiismo li rompis al si la klaviklon sur permana karboelekta maŝino. Dum la regado de Kuomintang, li suferis de malsato kaj frostoj kaj malsaniĝis pro longa penlaborado. Post la Liberiĝo, li fariĝis mastro de la ŝtato, kaj tiutage li estis en deĵoro por direkti la produktadon de la karboelekto per peza perilo. En la pasinteco, tutajn tagojn li portadis minaĵojn tiel pene, ke lia dorso kurbiĝis, sed hodiaŭ li direktas la maŝinojn per elektraj butonoj. Li diris emocie: “Ĉio ĉi tio venis de la nova socio sub la gvido de nia amata Prezidanto Maŭ; se ne estus la nova socio, ne povus esti mi Meng Ĝaŭkuj!”



Bonkvalita karbo elektita de la karboelekta laborejo atendas transportadon al diversaj lokoj de la patrolando.

Marnavigo dependas de stiristo, kaj revolucio dependas de Maŭzedongpenso. La ministoj ĉiutage soife lernas Maŭzedongpenson, precipe post la komenco de la Granda Proletara Kultura Revolucio, ilia viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso leviĝis al nova nivelo. Juna ministro kamarado Vang Gingŝeng estas filo de malriĉkamparano, kies familianoj laboris de generacio al generacio kiel jardungitoj por bienuloj kaj multege suferis de subpremado de la klasa kaj nacia malamikoj. En 1948, Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio savis lin el mizero kaj suferoj kaj li kore sentas, ke Prezidanto Maŭ estas la savanto de la laborantaj amasoj kaj Maŭzedongpenso estas la vivradiko. Dum la dekkelkaj jaroj post lia eniro al la minejo, li persistas en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, sekvante la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “**pravas ribelo kontraŭ la reakciuloj**”, li faris grandan kontribuon gvidante vastajn amasojn de ministoj en strikta sekvado de la granda strategia

dispozicio de Prezidanto Maŭ, estis elektita kiel vicestro de la revoluciaj komitatoj de Liaŭning-provinco kaj la urbo Fuŝun. En 1969, li glorie ĉeestis la Naŭan Tutlandan Kongreson de la Partio, estis elektita kiel membro de la Prezidantaro kaj feliĉe sidis proksime de Prezidanto Maŭ kaj Viceprezidanto Lin. Parolante pri tio, la ministoj senescepte diras emocie: “En la malnova socio, ni ministoj estis rigardataj kiel malestimindaj ‘nigraj karbuloj’, sed hodiaŭ ni jam povas partopreni ŝtatan administradon. Nur en la nova socio sub la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ povas okazi tia ĉielrenversa ŝanĝo!”

Kiam ni forlasis la liberĉielan karbominejon Hongvej, nokto jam vualis. Tiam la karbomaro fariĝis impona bildo ankoraŭ pli bela. Brilegis lampoj ruĝaj, verdaj, flavaj kaj blankaj en la aero kaj sur la fervojo rapidegis vagonaroj, kiuj portas karbon al diversaj lokoj de nia patrio. Jen, kuŝas antaŭ ni ne pelvosimila min-kavego, sed giganta “pelvo de trezoroj” de nia patrolando!

Fluge Impetas la Agrikultura Mekanikigo

BONEGA SITUACIO DE PRODUKTADO

Stimulate de la Granda Proletara Kultura Revolucio, la afero de agrikultura mekanikigo de nia lando disvolviĝas prospere.

La kuranta jaro estas la jaro de plej rapida disvolviĝo de la agrikultura mekanikigo de nia lando en la historio. En la unua jarduono de la kuranta jaro, la totala produkta valoro de agrikultura maŝino de la tuta lando estas je 22% pli alta kompare kun tiu de la sama periodo de 1966. Multe kres-

kis la produktokvanto de ĉefaj agrikulturaj maŝinoj. La nombro de mantraktoroj produktitaj en la unuaj sep monatoj de la kuranta jaro estas duoblo de tiu de 1966. La produkto de agrikultura pumpilo por profunda puto estas plenumita je 2.4 obloj super la plano. Ankaŭ la produktokvanto de hommovataj rizidplantiloj oble pli grandigis en la lastaj jaroj. La specoj de ĉefaj agrikulturaj maŝinoj nombris pli ol 1,000 kaj estas je 300 pli multaj kompare kun tiuj de 1966.

Multaj agrikulturaj maŝinoj produktitaj de nia

Motoraj rizidplantmaŝinoj "Dongfeng-tipo-2" fabrikitaj de la Rizidplantmaŝina Fabriko de Lejjang-gubernio de Hunan-provinco estas en laborado.



lando, ekzemple traktoro, kombajno, mekanika rizidplantilo, granda aksflua pumpilo k. a., ĉiuj estas produktitaj laŭ la lokaj naturaj kondiĉoj kaj produktaj karakteroj, kaj ĉiuj estas malpezaj, malgrandaj kaj facile manipuleblaj kun granda efikeco, malalta kosto kaj simpla strukturo. La rapida disvolviĝo de la industrio de agrikultura maŝino akcelis agrikulturan mekanikigon kaj forte movis disvolviĝon de agrikultura produkto.

MARŜI EN BATALO

La afero de agrikultura mekanikigo de nia lando disvolviĝas kaj fortiĝas sub la direktado de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ. En 1955, antaŭ alveno de la alta tajdo de agrikultura kooperigo de nia lando, Prezidanto Maŭ jam montris, ke **“sub kondiĉoj en nia lando, devas esti unue kooperigo kaj poste la uzo de granda maŝino (en kapitalismaj landoj oni kapitalismigas agrikulturon)”**, kaj elmetis la fundamentan linion de efektivigo de agrikultura mekanikigo sur la bazo de agrikultura kolektivigo. Post popolkomunismo Prezidanto Maŭ refoje montris ke **“la fundamenta elirejo de agrikulturo estas mekanikigo”** kaj el-laboris serion da principoj kaj politikoj por efektivigo de agrikultura mekanikigo de nia lando. Firme sekvante la instruojn de Prezidanto Maŭ, la vastaj revoluciaj amasoj disvolvis la aferon de agrikultura mekanikigo de nia lando.

Sed la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj freneze opoziciis la proletaran revolucian linion de Prezidanto Maŭ. Unufanke ili energie distrumpetis, ke **“Ĉinio havas multajn homojn kaj malmultajn agroj, tial ne bezonas mekanikigon”**, celante opozicii efektivigon de agrikultura mekanikigo kaj strangoli la industrion de agrikultura maŝino rapide disvolviĝintan en la granda antaŭensalto. Aliflanke ili senskrupule predikis **“ampleksan entreprenon de la ŝtato”** kaj kompradoran filozofion de kontraŭ-revolucia reviziisma linio, opoziciis amasan movadon kaj serioze subpremis la aktivecon de la vastaj amasoj en entrepreno de mekanikigo.

En la ŝtorma Granda Proletara Kultura Revolucio, alte tenante la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso, la vastaj revoluciaj amasoj sur la fronto de agrikultura maŝino forte kritikis la kontraŭrevolucian reviziisman linion de Liu Ŝaŭki, tiel ke serio da eminentaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ pri agrikultura mekanikigo pli profunde gravuriĝis en la koron de la popolo

kaj la afero de agrikultura mekanikigo de nia lando fluge disvolviĝis antaŭen.

DISVOLVI LA AKTIVECON DE LA LOKAJ INDUSTRIOJ


En la fabrikado de agrikulturaj maŝinoj, persisti en samtempa entreprenado de centraj kaj lokaj industrioj, persisti en la orientilo sinapogi ĉefe sur propraj fortoj de loko, plene disvolvi la aktivecon de loka entreprenado de industrioj, tio estas unu el la gravaj faktoroj de la rapida disvolviĝo de la afero de la agrikultura mekanikigo de nia lando. Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ **“sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj”**, la diversnivelaj revoluciaj komitatoj de la provincoj, municipaloj kaj aŭtonomaj regionoj energie entreprenis lokan industrion de agrikulturaj maŝinoj kaj akiris grandajn sukcesojn. Nun pli ol 80% el la gubernioj de la lando starigis riparejojn kaj fabrikojn de agrikulturaj maŝinoj, kaj en multaj lokoj jam formiĝis ripara kaj fabrika reto en tri niveloj de gubernio, komunumo kaj brigado. Fabrikoj de agrikulturaj maŝinoj de dudek kelkaj provincoj, municipaloj kaj aŭtonomaj regionoj de nia lando jam fabrikas traktorojn de diversaj tipoj konformajn al la bezono de la loka agrikulturo. Ĝegiang-provinco, la grava produktejo de rizo, antaŭe ne povis fabrikii traktorojn. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, disvolvante la revolucian spiriton de **“sinapogo sur propraj fortoj”** kaj **“penema luktado en malfaciloj”**, la vastaj amasoj de laboristoj alprenis simplajn metodojn konformajn al la lokaj kondiĉoj kaj rapide starigis sian propran traktoran industrion. En la komenco de la kuranta jaro, la provinco organizis koncernajn fabrikojn en la provinco disvolvi socialisman kunlaboron por fabrikii traktorojn de kvar tipoj taŭgajn al uzado en montregiono, ebenejo kaj montetaro, tiel ke rapide disvolviĝis la produktado de traktoroj de la tuta provinco.

Nun, kun la vigla disvolviĝo de la loka industrio multaj lokoj de nia lando konstruis malgrandajn ŝtalajn kaj ferajn fabrikojn, malgrandajn karbajn minejojn, malgrandajn maŝinajn fabrikojn kaj malgrandajn elektrostaciojn, kiuj pretigis favorajn kondiĉojn por disvolvo de la industrio de agrikulturaj maŝinoj. Multaj lokoj fabrikis agrikulturajn maŝinojn per ŝtalo, fero, ilmaŝinoj, hejtajoj kaj movforto de ili mem produktitaj, dank' al kio tiuj lokoj povas plene uzi la lokajn riĉfontojn kaj disvolvi la aferon de agrikultura mekanikigo multe, rapide, bone kaj ekonomie.

VASTE KONDUKI AMASAN MOVADON DE AGRIKULTURILA REFORMO

La vastaj amasoj de laboristoj, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj estas spertoplenaj en praktiko. Plene mobilizi ilin, vaste konduki amasan movadon de agrikulturila reformo, efektiviĝi "triflankan kombiniĝon" kun laboristoj, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kiel ĉefa parto kaj kun partopreno de revoluciaj kadroj kaj revoluciaj teknikistoj, esplori, fabriki kaj disvastigi duonmekanikajn agrikulturajn instrumentojn per metodoj konformaj al la karakteroj kaj praktika bezono de loka agrikultura produkto, paŝpostpaŝe transiri de agrikulturila reformo al duonmekanikigo kaj mekanikigo, tio estas ĝusta vojo de rapida disvolvo de agrikultura mekanikigo.

En 1969, en Hejlonggiang-provinco, kie oni semas strie, pli ol dek mil personoj partoprenis la amasan movadon de agrikulturila reformo, reformis kaj disvastigis pli ol 21,000 novtipajn agrikulturajn instrumentojn. La provinco reformis kaj fabrikis pli ol 100 specojn de agrikulturaj instrumentoj kiaj traktoroj, plugiloj, erpiloj, semmaŝinoj, draŝmaŝinoj k.a., kiuj konformas al la lokaj kondiĉoj. Ekzemple, la provfabrikita traktoro "Nova Aŭroro"-60 povas iri per raŭpoj aŭ radoj kaj fari plurajn laborojn. La amasoj de Hebej-provinco aktive reformis putodrilajn maŝinojn, drilis multe da putoj, fabrikis drenajn kaj irigaciajn instrumentojn, sinapogante sur siaj propraj fortoj kaj per metodoj konformaj al la lokaj kondiĉoj. Ekde 1966, en la tuta provinco oni drilis 160,000 maŝinputojn, tiu nombro estas 2.5-oble pli granda ol tiu antaŭ la granda kultura revolucio. La irigaciata areo estas pligrandigita kaj en la agrikultura produkto aperis grandega ŝanĝiĝo, tiel ke ĉiu agri-



Traktoroj produktitaj de la Fabriko de Malgrandtipaj Traktoroj de Ŝengjang estas transportataj por subteni la agrikulturan produkton.

kultura persono havas meznombre unu muon da tero irigaciata. La Guanghi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono kaj aliaj lokoj produktantaj rizon, entuziasme reformis kaj disvastigis rizidplantmaŝinojn kaj akiris rimarkindajn efikojn. Nun, nur Vuming-gubernio de Guanghi havas jam pli ol 8,100 rizidplantmaŝinojn, kaj rizidoj sur 70% de la kampoj de la gubernio estas plantitaj per maŝinoj; la maŝinplantado estas duoble pli rapida ol la manplantado kaj krome, ĝia produktokvanto kreskis je 20-30%.

DISVOLVI AGRIKULTURAN MEKANIKIGON PER FORTO DE KOLEKTIVA EKONOMIO

Fabriki agrikulturajn maŝinojn sinapogante sur la propraj fortoj de kolektiva ekonomio estas alia grava faktoro de rapida disvolviĝo de la afero de agrikulturaj maŝinoj de nia lando. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, kun Maŭzedongpenso kiel armilo, la vastaj amasoj de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj forte kritikis la reviziisman nigran varon kolportitan de Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj "monopolan entreprenon de la ŝtato", kaj senprecedence alta estas ilia aktiveco de entrepreno de agrikultura mekanikigo sinapoganta sur la propraj fortoj. Nun, kun la firmiĝo kaj disvolviĝo de la kolektiva ekonomio de popolaj komunumoj, pli kaj pli multiĝis agrikulturaj maŝinoj aĉetitaj per fortoj de kolektiva ekonomio. En disvolvo de la agrikultura mekanikigo, la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj de Liugi-komunumo de Hingou-gubernio, Hubej-provinco, laŭ sia ekonomia forto,

aĉetis drenajn kaj irigaciajn maŝinojn, kiuj povas ne nur multe ŝpari labormanojn kaj doni rimarkindan efikon en pliprodukto, sed ankaŭ prilabori agrikulturajn produktaĵojn en sezono de malmultaj kampaj laboroj. Poste, sur tiu ĉi bazo, ili aĉetis traktorojn, ŝarĝaŭtojn kaj aliajn grandajn maŝinojn per monrimedo iom post iom akumulita. Ĝis nun, la investo de tiu komunumo por agrikulturaj maŝinoj atingis 1,200,000 juanojn, kiuj estis akumulitaj dank' al sinapogo sur propraj fortoj. La komunumo jam efektivigis kompletan mekanikigon en drenado, irigaciado, draŝado kaj prilaborado de agrikulturaj produktaĵoj, kaj fundamentan mekanikigon en kultivado, transportado, vegetala protekto k. a. En Giangsu-provinco, ĉefa rizprodukta regiono en orienta Ĉinio, oni drenas kaj irigacias siajn plejpartajn kampojn per maŝino kaj elektro, kaj tiuj maŝinoj estas plejparte aĉetitaj de la komunumoj mem. La provinco akiris rimarkindajn sukcesojn ankaŭ en disvolvo de prilaboraj maŝinoj por agrikulturaj produktaĵoj kaj malgrandaj traktoroj.

Elektraj norioj produktitaj de la Aŭgusto-unua Fabriko de Agrikulturaj Maŝinoj en Hjuĉang, Henan-provinco, estas transportotaj per la kamiono al kamparo.



Mirakloj Kreitaj Dank' al Maŭzedongpenso

Responde al la granda alvoko de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “Unuiĝu por akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn”, la Pekina Ĝenerala Trikota Fabriko daŭre kaj profunde disvolvas la amasan movadon de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso, kio multe stimulis aktivecon kaj kreivon de la vastaj revoluciaj amasoj, tiel ke prospere disvolviĝas la socialisma revolucia konkurso en la tuta fabriko, ĉie floras teknikaj renovigoj, estas senĉese renovigitaj produktaj rekordoj, kaj sinsekve venas informoj pri venkoj en pliprodukto kaj ŝparo. Tiu fabriko jam plene kaj ekvilibre plenumis la produktan planon de 1970 antaŭdate je 132 tagoj.

La diversnivelaj partiaj organizoj de la tuta fabriko havas intiman ligiĝon kun la amasoj, gvidas la revoluciajn amasojn vive studi kaj vive apliki filozofiajn verkojn de Prezidanto Maŭ, kaj tiel pluapaŝe elvolvis sian gvidan rolon kiel avangardo de la proletaro. Jen membroj de la partia filio de la 6-a laborejo studas verkojn de Prezidanto Maŭ kune kun laboristoj kaj modeste petas iliajn opiniojn.





La produkto ĉiam pli progresas. Gelaboristoj senĉese atingas en venko ĉiam pli grandajn sukcesojn.



Ĉie floras teknikaj renovigoj. Jen membroj de la instrumenta grupo de la 8-a laborejo kaj teknikistoj kune studas problemon de teknika renovigo.

La Komercio de Nia

Lando en Prospero

ABUNDAS varoj, viglas negocoj kaj stabilas la prezoj tiel en la urboj kiel en la kamparo de nia lando.

ABUNDECO KAJ VIGLECO EN KOMERCO

Pli kaj pli boniĝas la provizado de varoj tiel en la urboj grandaj, mezgrandaj kaj malgrandaj kiel en la vasta kamparo de nia lando. Grandkvante plimultiĝas la varoj bezonataj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Rimarkinde pligrandiĝis la proviza kvanto de kotonŝtofoj, vestoj, trikotoj, lavtukoj, ŝtrumpoj, termosoj, emajlaĵoj kaj sintezaj lavpurigiloj sur la varbretoj de la ĉiovendejoj, bazaroj kaj vendejoj de baza nivelo. Kemiaj sterkoj, insekticidoj, feraj kaj lignaj agrikulturiloj estas ĝustatempe liverataj al la plejfronto de agrikultura produkto. Ĝenerale kreskis la proviza kvanto de la flankaj manĝaĵoj en la urboj, kiaj viandoj, ovoj, legomoj kaj fruktoj, kaj precipe tiu de legomoj kaj fruktoj kreskis rimarkinde. En la malabunda sezono de printempo de la kuranta jaro, ankoraŭ vendiĝas multaj diversaj fruktoj en la flankmanĝaĵovendejoj kaj fruktovendejoj de Pekino, Ŝanhajo kaj Tiangin. Kaj la provizado de legomoj neniam ĉesis en la tuta jaro. La komercejoj de Pekino sin okupantaj pri vendado de legomoj interkonsentis kun antaŭurbaj produktaj brigadoj, ke oni semu kaj liveru legomojn en periodoj kaj pligrandigu la kvanton de konservo por garantii konstantan provizon de legomoj al la vendejoj.

La prospero de komercio en la urboj kaj kamparo de nia lando spegulas, ke la industria kaj agrikultura produktado de nia lando rapide disvolviĝas sub la direktado de la ĝenerala linio elmetita de Prezidanto Maŭ "Streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭ-

en por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie". La agrikultura produkto de nia lando akiris riĉan rikolton en ok sinsekvaj jaroj kaj ankaŭ en la kuranta jaro akiris riĉan rikolton de la someraj kaj aŭtunaj plantoj. La ŝtata enaĉeta kvanto de someraj grenoj, oledonaj materialoj, porkoj, ovoj, teo, kokonoj kaj aliaj agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj plimultiĝis ol tiu de la sama periodo de la pasinta jaro. La planitaj taskoj de ĉefaj produktaĵoj de la malpeza industrio de la tuta lando, kiaj kotonaj ŝpinaĵoj kaj ŝtofoj, trikotoj, kemiaj fibroj, ĉiuj estas superplenumitaj. Interalie, la produktokvanto de kotona ŝpinaĵo kreskis je 19 procentoj kompare kun tiu de la sama periodo de la pasinta jaro, kaj tiuj de sukero, cigaredoj, salo, maŝinfabrikataj paperoj, kudromaŝinoj, bicikloj, brakhorloĝoj, lavpuriga pulvoro kaj aliaj ĉiutagaj bezonaĵoj kreskis respektive je 6 ĝis 55 procentoj kompare kun tiuj de la sama periodo de la pasinta jaro.

En multaj provincoj kaj regionoj, kie la fundamento de malpeza industrio estas relative malforta, granda nombro da malpezindustriaj entreprenoj estas starigitaj en mallonga tempo kaj altiĝis rapide la memproviza kapablo de produktaĵoj de malpeza industrio de tiuj lokoj. En la unua duono de la kuranta jaro, pli ol 3,000 fabrikoj, laborejoj kaj produktaj grupoj de malpeza industrio estas nove starigitaj en Hejlonggiang-provinco kaj produktis pli ol 300 specojn da varoj bezonataj de la merkato. En Gianghi-provinco, pli ol 1,000 mezgrandaj kaj malgrandaj entreprenoj de malpeza industrio estas nove starigitaj, produktis pli ol 200 novajn specojn da produktaĵoj kaj dank' al la disvolviĝo de la loka malpeza industrio multe plimultiĝis la produktaĵoj el lokaj materialoj kaj ĉeloke vendataj kaj ĉiam pli riĉiĝas la fonto de varoj.

Prosperas la komerco tiel en la urboj kiel en la kamparo de nia lando kaj viglas negocoj, kio spegulas la pliapaŝan altiĝon de la vivnivelo de la vasta laboranta popolo. La totala kvanto de venditaj varoj en la unua duono de la kuranta jaro rimarkinde pligrandiĝis kompare kun tiu de la sama periodo de la pasinta jaro. Bicikloj, radiatoriceviloj, kudromaŝinoj kaj similaj varoj havas grandan debiton en la urboj kaj kamparo.

STABILA PREZARO

La prezoj de la diversaj varoj en la merkato de nia lando estas planitaj. Tiuj prezoj estas difinitaj laŭ la leĝoj de la socialisma ekonomio kaj serio da orientiloj kaj politikoj de la Partio. Antaŭ la Liberiĝo, dum la regado de la kuomintanga reakciularo, salte leviĝis la prezoj, kaj la vasta laboranta popolo vivis en tiaj malfacilego kaj tragika mizerego, ke ĝi matene ne estis certa pri sia vivo en la vespero. En la komenca periodo post la Liberiĝo de nia lando, nia Partio rapide ŝanĝis radikale la staton de salta leviĝado de la prezoj kaj malfacilega vivo de la popolo, kiu longe ekzistis en la malnova Ĉinio. De post tiam, la ŝtato alprenis serion da politikoj kaj aranĝoj, tiel ke la prezoj de nia merkato ĉiam restas stabilaj, stabila vivo de la popolo estas garantiata kaj pretiĝas kondiĉoj por pli bone konduki socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon. Por redukti la diferencon inter la prezoj de la indus-

triaj kaj agrikulturaj produktaĵoj, kiun postlasis la malnova Ĉinio, ni stabiligis aŭ malaltigis la podetalajn prezojn de industriaj produktaĵoj, samtempe kun laŭplana, paŝpostpaŝa altigo de la enaĉetaj prezoj de parto de agrikulturaj produktaĵoj. Nun la kamparanoj povas ricevi interŝanĝe pli multe da industriaj produktaĵoj ol antaŭe kontraŭ sama kvanto da agrikultura produktaĵo. Ni prenu tritikon kaj kotonon kiel ekzemplojn. La kvanto de salo ricevata interŝanĝe kontraŭ tritiko pligrandiĝis je pli ol 70 procentoj ol en la komenca periodo post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko kaj tiu de keroseno interŝanĝe akirata kontraŭ difinita kvanto da kotono 1.4-oble plimultiĝis. La redukto de la diferenco inter la prezoj de la industriaj kaj agrikulturaj produktaĵoj pliapaŝe solidigis la aliancon inter la laboristoj kaj kamparanoj kaj akcelis disvolviĝon de la produktado. Por certaj komercaĵoj, kiaj libroj, medikamentoj kaj alumetoj, oni difinis samajn prezojn por la tuta lando. La sezonaj diferencoj de prezoj ne nur estas nuligitaj, sed ankaŭ la elvendaj prezoj estas tenataj fundamente sensanĝaj post altigo de la enaĉetaj prezoj de la ŝtato. Ĉio ĉi enkorpiĝas la profundan zorgon de niaj Partio kaj ŝtato al la vasta laboranta popolo.

La plurfojaj malaltigoj de la prezoj de medikamentoj en la lastaj jaroj pli konkrete montras la prizorgon de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj nia Centra Komitato de la Partio al la sano de la vasta laboranta popolo kaj spegulas la superecon

Huafeng-a Frukta Butiko ĉe Nankin-strato de Ŝanhajo



de la socialisma sistemo de nia lando. La malaltigo de la prezoj de medikamentoj havas gravan politikan signifon por ŝanĝi la fizionomion de la medicina laboro en nia kamparo kaj altigi la nivelon de sano de nia popolo kaj estas varme laŭdata de la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mez-kamparanoj.


SERVI AL LABORISTOJ, KAMPARANOJ KAJ SOLDATOJ

La senĉesa pliprosperejo de la komerco en niaj urboj kaj kamparo ankaŭ estas nova frukto akirita de la komerca branĉo en pliapaŝa efektivigo de la granda orientilo de Prezidanto Maŭ **“disvolvi ekonomion kaj garantii provizadon”**. En la bonega situacio de disvolviĝo de la industria produktado, alte tenante la grandan ruĝan standardon de Maŭ-zedongpenso, la vastaj amasoj de komercaj laborantoj profunde kritikis la kontraŭrevolucion reviziisman nigran varon **“profito en komando”** distrumpetitan de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj pliapaŝe starigis la penson kaj stilon de servado al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj en entreprenado. Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ ili faras detalan enketadon kaj esploron en la kamparo, donas helpon en disvolvo de produkto kaj bone ludas la rolon de proviantistoj por la industria kaj agrikultura produktado. La komercaj sekcioj de la provincoj Gilin, Hejlonggiang,

Ŝenhi, Gianghi kaj aliaj aktive ludis la rolon de ponto kaj interligilo en akcelado de disvolviĝo de la loka industrio. En la urbo Gilin, koncernaj instalaĵoj en kunlaboro de la urba ĉiovenda sekcio starigis 39 malgrandajn fabrikojn de ĉiutagaj bezonaĵoj kaj produktis 152 novajn produktaĵojn bezonatajn de la loka merkato. Jaŭ-an-gubernio de Junnan-provinco havas riĉan fonton de ligno kaj bambuo, sed de longa tempo ĝi devis enporti lignajn kaj bambuajn varojn. En la kuranta jaro, la komerca sekcio de tiu gubernio sendis grandan nombron da personoj al komunumoj kaj brigadoj por helpi la brigadojn disvolvi flankokupan produktadon surbaze de la principo **“preni grenon kiel ĉefĉeneron”**. Ili helpis la komunumojn kaj brigadojn kulture teknikajn laborantojn por produkti bambuajn, lignajn, ferajn kaj fajencajn varojn kaj starigi sintezajn prilaborejojn, tiel ke la tuta gubernio jam povas memprovizi al si plejparte la bezonatajn bambuajn kaj lignajn varojn. Laŭ la postulo de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, la komercaj sekcioj de multaj lokoj ĝenerale rearanĝis sian servotempon, starigis aldone novajn servajn retojn kaj punktojn, plivastigis la sferon de sia entrepreno kaj dissendas rondirajn grupojn en montarojn kaj al la kamparo aŭ en stratojn de urboj por pli oportune servi al la klientoj. La laborantoj de la vendejo de Ŝibanjan de Lenhian-gubernio, Henan-provinco persistas ĉe la laŭdinda spirito **“porti varojn al domoj de klientoj”** en multaj jaroj kiel en unu

Antaŭurbaj komunumanoj de Pekino aĉetas katunon.





Butiko de akvoproduktaĵoj ĉe Dagulu-strato de Tiangin

tago, vige aktivadante en profunda montaro. Por subteni la socialisman konstruadon, ili portis varojn korbojn post korboj sur montojn kaj vektoportis montajn produktojn malsupren kaj tiel akcelas disvolviĝon de agrikulturo kaj garantias provizon de vivbezonaĵoj de la laboranta popolo. La lokaj amasoj intime nomas ilin “intima vendejo de la montregiona popolo”.

En la urboj Pekino, Ŝanhajo, Tiangin, Nankino, Ginan k. a., oni fondis vendejojn por servi al klientoj frumatene, vespere aŭ tra la tuta nokto ĉe fervojaj stacioj, havenoj, gravaj trafikejoj kaj fabrikoj kaj minejoj kie koncentriĝas loĝantoj, por garantii ke vojaĝantoj kaj laboristoj de nokta deĵoro povu aĉeti por si vivbezonaĵojn. Tiuj servopunktoj ricevis laŭdojn de la vastaj amasoj de klientoj.

Serĉo de Nova Vojo por Alta Produkto de Rizo

KUN profunda proletara sento al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, vive studante kaj vive aplikante lian brilan filozofian penson, Li Guangking, agrikultura labormodelo kaj la sekretario de la partia filio de Ĝuanggiakiaŭ-brigado de Fengŝu-komunumo en Taŭjuan-gubernio, Hunan-provinco, solvis la renkontitajn kon-

traŭdirojn dum sia eksperimentado kaj plivastigo de la sistemo de tri rikoltoj unujare sur rizkampoj kaj faris kontribuon al rapida pliigo de grena produkto.

En la komenco de la jaro 1966, kiam Li Guangking vizitis la regionon de Fuĝoŭ en Fugian-provinco, li rimarkis tie ke la sistemo de tri rikol-

toj en unu jaro (du de rizo kaj unu de tritiko) ebligas multe altigi pomuan grenprodukton. Reveninte de la vizito, li komencis eksperimenton de la sistemo de tri rikoltoj kun decido serĉi novan vojon de alta produkto de rizo.

En la komenco de la eksperimento, iuj esprimis dubon konsiderante ke la loka klimato diferencas de tiu de Fuĝoŭ: ĉi tie frosta vetero venas pli frue kaj prujna periodo daŭras pli longe. Tamen, Li Guangking ne ŝanceliĝis aŭdinte tion kaj pacience persvadis ilin, dirante: "Kvankam la klimato ĉe ni diferencas iurilate de tiu de Fuĝoŭ, tamen ni povos venki la naturajn kondiĉojn malfavorajn al la tririkolta sistemo kaj ŝanĝi la malfavorajn kondiĉojn en favorajn, se ni nur agos laŭ la instrukcioj de Prezidanto Maŭ, vive studos kaj vive aplikos serioze la brilan filozofian penson de Prezidanto Maŭ, plene mobilizos la aktivecon de homoj, konos kaj mastros objektivajn leĝojn dum praktikaĉo." Krome, li ankaŭ gvidis la amasojn al ripetada studo de la granda instruo de Prezidanto Maŭ ke **"en la kampoj de la produkta batalo kaj scienca eksperimento, la homaro ĉiam konstante disvolviĝas kaj ankaŭ la naturo ĉiam konstante disvolviĝas; ili neniam restas sur la sama nivelo"** arman-te ilin per Maŭzedongpenso, por ke la amasoj rompu siajn [superstiĉojn kaj liberigu sian penson. Rezulte de tio, ĉiuj entuziasme subtenis lin en la eksperimento, helpis lin ordigi la eksperimentan kampon kaj havigis al li semojn oportunajn por tririkolta sistemo, tiel ke la eksperimento povis esti entreprenata en vintro de 1966.

En la eksperimento, Li Guangking renkontis serion da kontraŭdiroj kiaj nesufiĉeco de laborfortoj kaj sterko, kaj malfruiĝo de la tempo. Kiel do solvi tiujn kontraŭdirojn?

En la verko de Prezidanto Maŭ *Pri Kontraŭdiro*, Li Guangking ricevis sugestion. Prezidanto Maŭ instruas al ni, ke **"ĉe studo de kiu ajn procezo, se tiu estas komplika, enhavanta du aŭ pli multajn kontraŭdirojn, ni devas fari nian plejeblon por trovi la ĉefan kontraŭdiron. Kiam tiu ĉi estas kaptita, ĉiuj problemoj povas esti facile solvitaj."**

"Prave! Por konduki bovon oni devas tiri ĝian nazon." La menso de Li Guangking subite ricevis plenan lumon. Sed kio estas la "bovnazo"? Li kalkulis: por kreskigi dufoje rizon kaj unufoje tritikon oni bezonas entute 390 tagojn, sed unu jaro enhavas nur 365 tagojn; se oni ne solvos la problemon pri manko de 25 tagoj, la tririkolta sistemo ja estos nur manovro sur papero.

Post diligenta priesploro, multfoja analizo kaj interkomparo, Li Guangking finfine venis al la konkludo ke la tempo estas la "bovnazo" kaj la ĉefa inter multaj kontraŭdiroj. Post tio, li vaste petis konsilojn de malriĉkamaranoj, malsuperaj mezkamaranoj kaj spertaj maljunaj kamaranoj, kaj samtempe lernis alilokajn spertojn, kaj fine estis trovita rimedo por solvi la kontraŭdiron, nome, elekti rapidmaturiĝan specion, frue kreskigi plantidojn kaj plilongigi ties periodon de kresko en plantidejo, kio relative mallongigis la periodon de kresko de la plantoj sur la kampoj. El la eksperimento rezultis ke la frua rizo povis esti rikoltita post nur 60-taga kresko sur la kampoj, 20 tagojn pli frue ol en la pasinteco. Tio ebligis pli fruan transplantadon de la malfrua rizo, tiel ke ĝiaj spikoj povis sekure maturiĝi antaŭ la alveno de frosta vetero.

La problemo de la tempoj por frua kaj malfrua rizo solviĝis, sed ankoraŭ mankis 5 tagoj, kio koncernis problemon pri ĝustatempa semado de la vintra tritiko. Se oni ne povos ĝin kreskigi bone, tio returne influos la kultivon de la du rikoltoj de rizo. Lerninte alilokajn spertojn, Li Guangking semis tritikon sur la spaco inter la linioj de la rizplantoj, kiam kliniĝis spikoj de la malfrua rizo en la meza tagdeko de oktobro. Post rikolto de la malfrua rizo estis farita buto al la tritiko. Tio garantiis al la tritiko sufiĉan tempon por kreskado kaj maturiĝo. Tiamaniere, la frua rizo povis esti ĝustatempe transplantata sur la kampojn kaj sukcesis la eksperimento de tri rikoltoj en unu jaro. Tiun jaron, oni rikoltis pomue 1,465 ĝinojn da greno sur la pli ol 4 muoj da eksperimentaj kampoj de Li Guangking, kun pliprodukto de 379 ĝinoj super la meznombra produkto de greno de la tuta brigado en 1966.

En 1968 Ĝuanggiakiaŭ-brigado disvastigis la tririkoltan sistemon sur kvarono de siaj rizkampoj. En tiu tempo nesufiĉo de sterko kaj laborfortoj fariĝis la ĉefa kontraŭdiro. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ **"la ĉefa kaj la neĉefa flankoj de kontraŭdiro transformiĝas unu en la alian"**. Li Guangking mastris la kondiĉojn de transformiĝo de kontraŭdiroj kaj ĝustatempe solvis la problemon. Li Guangking kaj liaj kamaradoj energie disvolvis porko-bredadon kaj efektivigis la planon, ke ĉiu en la brigado havis meznombre unu porkon. La pliiĝo de porkoj sekvigis pliiĝon de sterko. Tio bone solvis la problemon de provizado de sterko por grandarea plivastigo de la tririkolta sistemo. Samtempe kun tio, la brigado aplikis elektran energion en plugado kaj irigaciado kaj ak-

tive disvolvis mekanikigon en agrikulturaj laboroj, tiel solvis la problemon de nesufiĉo de laborfortoj.

Kvankam sukcesis la sistemo de tri rikoltoj en unu jaro, tamen Li Guangking ne haltis antaŭ tio. Li daŭre vive studis kaj vive aplikis la brillan filozofian penson de Prezidanto Maŭ en sia scienca eksperimento por batalakiri pli altan produktoton de grenoj. En sia sukceso li vidis la mankon ke la pomua produktokvanto de la malfrua rizo en la tririkolta sistemo estas 30-40 procentojn pli malalta ol tiu de la frua rizo. Li Guangking cerbumis pri tio, kia pliiĝo estos la grena produkto, se la pomua produktokvanto de la malfrua rizo atingos aŭ superos tiun de la frua rizo! Li faris firman decidon por tion efektiviĝi.

Li Guangking faris sciencajn analizojn pri la kreskado de la malfrua rizo kaj konkludis ke tio, ke la pomua produktokvanto de la malfrua rizo estas malpli alta ol tiu de la frua rizo, enhavas eksterajn kaŭzojn kaj ankaŭ internajn. La ekstera kaŭzo estas tio ke en la posta periodo de kresko de malfrua rizo la vetero fariĝas jam malvarma kaj tuj post tio alvenas la frosta vetero, kio malfavoras al la kreskado kaj fruktado de rizo; la interna kaŭzo estas tio ke mankis sufiĉa esploro pri kultivado de la plantidoj kaj flegado de la malfrua

rizo, tiel ke la problemo de ĝia manko de kontraŭfrosta kapablo neniam estis kontentige solvita. Sekvante la brillan aserton de Prezidanto Maŭ ke “Ĝi [materiisma dialektiko] konsideras eksterajn kaŭzojn kiel la kondiĉon de ŝanĝo kaj internajn kaŭzojn kiel la bazon de ŝanĝo, kaj ke eksteraj kaŭzoj efikas nur pere de la internaj”, Li Guangking komencis sian klopodon por solvi la internajn kaŭzojn surbaze de sia analizo. Antaŭ ĉio li faris teknikan reformon en semado, anstataŭ semi dense kaj akiri maldikajn plantidojn semi maldense kaj akiri fortikajn plantidojn kun granda rezistforto. Due, post transplantado estis intensigita la surkampa flegado per racia irigacio, sunumado de la kampoj, kontrolo de la distigiĝo de rizplantoj por ke la fortika ĉefspiko fruktiĝu. Tiel la kontraŭfrosta kapablo de la rizplantoj estis plifortigita kaj kun tio oni ankaŭ alprenis aliajn konvenajn paŝojn, rezulte ke en tiu jaro la eksperimenta kampo de Li Guangking donis meznombrian pomuan rikolton de 1,768 ĝinoj. Kaj la produktokvanto de la malfrua rizo estis je 122 ĝinoj pli multa pomue ol tiu de la frua rizo. Do lia celo venke realiĝis. En la lasta jaro, kiam tiu sperto disvastiĝis en Ĝuanggiakiaŭ-brigado, ĝi fariĝis la unua brigado en la tuta provinco, kies malfrua rizo superis la fruan rizon en produkta kvanto.


Li Guangking (dekstre) kaj komunumano kune resumas la sperton pri la riĉa rikolto de frua rizo.



La Armeanoj kaj Popolanoj de Nia Ĉefurbo Ĝoje Celebras la 21-an Datrevenon de la Fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko



La 1-an de oktobro, kvarcent mil armeanoj kaj popoloj de nia ĉefurbo okazigis solenajn mitingon kaj manifestacion por ĝoje celebri la 21-an datrevenon de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Gigantaj modeloj de verkoj de Prezidanto Maŭ kaj parada ĉaro portanta ruĝan standardon kun la surskribo "Marnavigo dependas de stiristo, kaj revolucio dependas de Maŭzedongpenso" ĉirkaŭataj de amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj manifestaciantaj elstare spegulas la profundan disvolvigon de la amasa movado de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso fare de nia popolo.



La giganta modelo de torĉo sur parada ĉaro en la kolonaro de grandpaŝe antaŭenmarŝantaj manifestaciantoj kaj la figuro de torĉo formita de pli ol cent mil homoj sur Tian-anmen-placo simbolas, ke revolucia fajro brulas tra la tuta tero.

我们一定要解放台湾



La plene armitaj milicianoj brave marŝas tra Tian-an-men-placo por ricevi revuadon de nia plej supera ĉefkomandanto Prezidanto Maŭ kaj vicĉefkomandanto Vicprezidanto Lin.

Komandantoj kaj batalantoj de nia armeo feliĉe vidas nian grandan gvidanton Prezidanto Maŭ. Ili senĉese krias: "Longan vivon, longan longan vivon al Prezidanto Maŭ!"





La manifestaciantaj amasoj varme krias: "Vivu Prezidanto Maŭ!"

Buntaj artfajraĵoj jen kaj jen iluminas la firmamenton de la nacifesta vespero.



东方 红¹

Dōngfāng Hóng

(orienta direkto ruĝa)

Ruĝas la Oriento

东方 红, 太阳 升,
Dōngfāng hóng, tàiyáng shēng,
(orienta direkto ruĝa suno levigi
Ruĝas la Oriento, levigas la suno,

中国 出了 个 毛 泽东;
Zhōngguó chūle gè Máo Zédōng;
Ĉinio aperis ... Maŭ Zedong
En Ĉinio aperis Maŭ Zedong;

他 为 人民 谋 幸福, 呼 儿 咳 呀²,
Tā wèi rénmin móu xíngfū, hu er hai ya,
li por popolo akiri feliĉo hu er haj ja
Li laboras por feliĉigi la popolon, hu er haj ja,

他 是 人民 大 救 星。
Tā shì rénmin dà jiùxīng.
li esti popolo granda savstelo
Li estas granda savanto de la popolo.

毛 主 席, 爱 人 民,
Máo-zhǔxí, ài rénmin,
Maŭ prezidanto ami popolo
Prezidanto Maŭ amas la popolon,

他 是 我 们 的 带 路 人;
Tā shì wǒmen de dàilùrén;
li esti ni de vojevguidanto
Li estas nia vojevguidanto;

为了 建设 新 中国, 呼 儿 咳 呀,
Wèile jiànshè xīn Zhōngguó, hu er hai ya,
por konstrui nova Ĉinio hu er haj ja
Por konstrui novan Ĉinion, hu er haj ja,

领导 我们 向 前 进。
Lǐngdǎo wǒmen xiàng qián jìn.
gvidi ni -n antaŭe marŝi
Li gvidas nin marŝi antaŭen.

共产党, 象 太阳,
Gòngchǎndǎng, xiàng tàiyáng,
komunista partio simili suno
La Komunista Partio similas al la suno,

照 到 哪里 哪里 亮;
Zhào dào nǎli nǎli liàng;
brili al kie kie lumi
Lumas ĉie, kie ĝi brilas;

哪里 有了 共产党, 呼 儿 咳 呀,
Nǎli yǒule Gòngchǎndǎng, hu er hai ya,
kie ekhavi komunista partio hu er haj ja
Kie aperas la Komunista Partio, hu er haj ja,

哪里 人民 得 解放。
Nǎli rénmin dé jiěfàng.
kie popolo akiri liberiĝi)
Tie liberiĝas la popolo.

[Klarigo] En ĉiuj unuaj linioj estas ĉinaj ideografiaĵoj; en ĉiuj duaj linioj estas ties skribformo en la fonetika alfabeto; en ĉiuj triaj linioj estas signifoj de koncernaj vortoj en Esperanto; kaj en ĉiuj kvaraj linioj estas esperanta traduko de la frazoj. Necesaj klarigoj por malfacilaj punktoj estas donataj sube:

1. Tiu estas la plej ŝatata laŭdkanto de la ĉina popolo pri la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la komencan parton de ĝia muziko elsendis nia artefarita tersatelito. Ĉi tie la esperanta traduko estas farita proze.
2. La silaboj 呼儿咳呀 estas interjekcio por esprimi ĝojon.

Impresoj de Francaj Amikoj pri Vizito al Ĉinio

ANTAŬTAGE de la ĉina nacia festo, francaj amikoj, kiuj vizitis Ĉinion en 1970, gaje kunvenis kaj libere elverŝis siajn impresojn pri vizito al Ĉinio. Inter ili estis laboristoj, instruistoj kaj oficistoj. En Ĉinio ili vizitis urbojn, kamparon, fabrikojn kaj popolajn komunumojn, intervidiĝis kun laboristoj, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, revoluciaj gvidaj kadroj, revoluciaj intelektuloj kaj junaj ruĝgvardianoj de Ĉinio. En la kunveno ili diris emocie, ke dum vizito en Ĉinio, ili ĉie ĝuis ekstreme varman kaj amikan bonvenigon. Tio, kion ili vidis kaj aŭdis en la socialisma Ĉinio, postlasis al ili neforgeseblajn impresojn kaj multe ilin kuraĝigas.

Post la vizito ili profunde sentis, ke ĉiuj atingoj de la ĉina popolo akiritaj en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado rezultas el la saĝa kaj ĝusta gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. La ĉina popolo senlime varme amas Prezidanton Maŭ, kun seriozeco vive studas kaj vive aplikas Maŭzedongpenson kaj agas laŭ instruoj de Prezidanto Maŭ. Maŭzedongpenso solide unuigis la sepcentmilionan ĉinan popolon.

Iu instruisto, kiu faris viziton al Ĉinio en 1967 kaj 1970, diris ke li vidis tre grandan ŝanĝiĝon en Ĉinio. Impresis al li forte, ke la amasa movado de la ĉina popolo vive studi kaj vive aplikis Maŭzedongpenson pli profundigas kaj havas pli altan nivelon. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la vastaj revoluciaj amasoj mastris kaj aplikis la armilon Maŭzedongpenson kaj akiris grandajn venkojn unu post alia. Alia amiko diris, ke la vizito en Ĉinio vere komprenigis ilin, kial la ĉina popolo senlime varme amas sian grandan gvindanton Prezidanto Maŭ, kaj pli konvinkis ilin, ke Maŭzedongpenso estas Marksismo-Leninismo en la nuna epoko, kaj ili nepre bone studos Maŭzedongpenson. Alia amiko parolis pri sia impresoj de vizito al la Muzeo de la Revolucio kaj Historio de Ĉinio. Li diris, ke dank' al la vizito li konis la gvidan rolon de Prezidanto

Maŭ en la konstruo kaj disvolvo de la Komunista Partio de Ĉinio, komprenis la longdaŭran kaj malfacilan batalon faritan de Prezidanto Maŭ por oponi kontraŭ la "maldekstra" kaj dekstra oportunismo kaj la signifon de la granda venko de la batalo. Li diris, ke estas vere prava la vorto "sen la gvido de Prezidanto Maŭ ne estus la venko de la ĉina revolucio". Kaj alia amiko diris, ke Maŭzedongpenso estas armilo de la ĉina popolo por akiri liberiĝon kaj venkon kaj ankaŭ armilo de la tutmondaj popoloj por akiri liberiĝon.

Maŭzedongpenso ŝanĝis la mondkoncepton de homoj. Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ "servu al la popolo", la ĉina popolo sinforgese luktas por la ĉina revolucio kaj la monda revolucio. Tio estas alia profunda impresoj de francaj amikoj dum ilia vizito.

Pluraj amikoj entuziasme laŭdis la proletaran internaciisman spiriton de la ĉina popolo. Ili diris, ke la granda afero, kiun la ĉina popolo plej zorgas, estas kompakte unuiĝi kun la revoluciaj popoloj de la tuta mondo kaj batali por faligi la usonan imperiismon kaj ĉiujn ĝiajn lakeojn. La ĉinaj kamaradoj-laboristoj brave esprimis, ke ili "laboras por la monda revolucio, starante ĉe maŝinoj kaj prenante la tutan mondon en la vido."

Tiuj amikoj diris, ke la brila penso de Prezidanto Maŭ "servu al la popolo" profundigis en la koron de la ĉina popolo, kaj tie oni laboras por la kolektivo kaj servas al la popolo laŭ instruoj de Prezidanto Maŭ. Ili laŭdis ankaŭ la solidan unuiĝon de la ĉina popolo formitan sur la bazo de Maŭzedongpenso.

La francaj amikoj diris ankoraŭ alian profundan impreson dum vizito en Ĉinio: La Granda Proletara Kultura Revolucio persone iniciatita kaj gvidata de Prezidanto Maŭ ŝanĝis la fizionomion de Ĉinio, liberigis la produktajn fortojn kaj inspiris la spiriton de la popolo pri daŭra revolucio. La ĉina popolo multe disvolvas la spiriton de sinapogo

sur propraj fortoj, penema luktado kontraŭ malfaciloj kaj revolucionan spiriton de kreado, kaj vigle disvolvigas la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.

Iu amiko diris, ke en fabrikoj la ĉinaj laboristaj amasoj firme tenas la batalon inter la du linioj, forte kritikis la reviziisman linion de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki, disvolvas la spiriton sinapogi sur propraj fortoj kaj akiris elstarajn atingojn en inventado, kreado kaj teknika renovigo.

Aliaj amikoj diris, ke en Ĉinio la popolo estas mastro de sia propra ŝtato kaj memkonscie laboras

por la patrio kaj socialismo. En Ĉinio ĉie iras konstruado kaj teknika renovigo.

Iu amiko diris, ke dum la vizito en Ĉinio li sentis ke la proletara diktaturo de Ĉinio pli firmiĝis kaj Ĉinio pli potenciĝis. Se malamiko aŭdacas ataki la socialisman Ĉinion, ĝi certe trafos kompletan fiaskon.

Li diris ankoraŭ, ke dum la vizito ili ĉie sentis profundan revolucionan amikecon inter la du popoloj de Ĉinio kaj Francio. Alia amiko diris emocie: Kvankam Ĉinio situas tre fore de ni, tamen ni sentas en la koro, ke ŝi estas apud ni kaj ke la nova Ĉinio estas eksterordinare intima por ni!



MEMSTREĈA DRATRETA CEMENTA PREMTUBO

La Hin-angiang-a Fabriko de Cementaĵoj de Ĝegiang-provinco sukcese provfabrikis memstreĉan dratretan cementan premtubon kaj komencis ĝin produkti pogrande.

Tiu premtubo estas tiel bonkvalita, ke ĝi povas esti uzata anstataŭ gisfera tubo, ĝi estas maldika kaj malpeza, ĝia produkto bezonas malpli multe da ŝtalo kaj malalta estas ĝia produktokosto. Ĝi ne nur konformas al la bezonoj de konstruoj de malgranda hidroelektrejo, drena kaj irigacia stacio kaj akvokonduko en la kamparo, sed ankaŭ estas aplikebla por konstrui tubliniojn por akvoprovizo aŭ trafluigo de oleo aŭ gaso en industrio en urboj.

NOVTIPA TEKSILO POR MULTKOLORA ŜTOFO

La vastaj amasoj de laboristoj de la Unua Teksejo de Fuĝoŭ, Fugian-provinco, sukcesis fabrikii novtipan teksilon por multkolora ŝtofo, per loke disponeblaj rimedoj, sin apogante sur la propraj fortoj.

Tiu teksilo povas aŭtomate kaj sekure produkti multkoloran kotonŝtofon, konsumante

malpli multe da elektro kun alta produktivo. Ĝi estas facile manipulebla, bonkvalita kaj unu laboristo povas zorgi samtempe pli multe da tiaj teksiloj. Dank' al ĝia apliko, unu laborprocedo estas ellasita, pli ol 40 facile eluzebaj pecoj ne plu estas bezonataj kaj krome malŝparo de ŝpinaĵo estas eliminata.

Post apliko de tiaj novtipaj teksiloj por multkolora ŝtofo, la produktivo de tiu fabriko plialtiĝis unuoble.

NOVA TEKNOLOGIO DE TINKTURADO DE SILKAĴOJ

La Hangĝoŭ-a Fabriko de Tinkturado de Silkaĵoj de Ĝegiang-provinco sukcesis krei novan teknologion de unuproceda tinkturado de silkaĵoj kaj forlasis la malnovan teknologion de tinkturado de silkaĵoj aplikatan dum dekoj da jaroj.

La malnova teknologio ne nur bezonis longan produktan linion kun multaj kompleksaj procedoj, sed ankaŭ altan produktan koston kaj krome certaj difektoj de la produktaĵoj estis ne elimineblaj.

Post apliko de la nova teknologio de unuproceda tinkturado de silkaĵoj, la 11 procedoj de la malnova metodo povas esti plenumitaj en unu fojo. Sperto el ĝia apliko en tinkturado de sep specoj de teksaĵoj kun pli ol 20 specoj de desegnoj, kiaj litkovriloj el silko kaj kotono kaj artefarita silkaĵo, montras, ke la produktaĵoj estas bonkvalitaj kun malpli alta produktokosto kaj la laborefiko estas alta.



Amika maĉo de tablotenisistoj de Ĉinio kaj Koreio

Korea Tablotenisa Teamo Vizitis Ĉinion

ĜONG HINGI

*Ruliĝas ondoj de Jalu-rivero,
Laŭdkantoj sonas alte ĝis ĉielo;
Ja fratoj estas la popoloj ĉina kaj korea,
El freŝa sango kreskas floro amikeca.*

.....

Tablotenisa Teamo de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio sub la gvido de sia estro Kan Jon Kvan kaj vicestro Kim Don Heub faris amikan viziton al nia lando. Dum ĝia vizito, tablotenisaj sportistoj de Ĉinio kaj Koreio kune okazigis amuzan kunvenon en la Somera Palaco de Pekino. Kun emocio ili laŭte kantis revoluciajn kantojn de ambaŭ landoj, deklamis ardajn poemojn kaj plenkore prikantis la grandan amikecon kaj batalan unuiĝon disvolviĝantajn inter la ĉina kaj korea popoloj kaj inter la sportistoj de ambaŭ landoj. Teamestro Kan Jon Kvan ĝoje diris: "Dum tiu

ĉi vizito, niaj koroj ĉiam ligiĝas kun tiuj de la ĉinaj kunbatalantoj!" Liaj vortoj plene esprimis la sinceran senton inter la sportistoj de la du landoj.

Por prikanti kaj priskribi la amikecon formitan el sango inter la popoloj de Ĉinio kaj Koreio ne sufiĉas miloj kaj miloj da kantoj nek miloj kaj miloj da vortoj. La sportistoj de la du landoj staras ŝultron ĉe ŝultro kaj manon en mano kiel gefratoj. La neforgeseblaj amikaj scenoj dum la vizito de la koreaj kunbatalantoj al Ĉinio reaperis kiel lumbildoj antaŭ la okuloj de la sportistoj.

APARTA INTIMECO INTER MALNOVAJ KUNBATALANTOJ JE REVIDO

En la pasintaj pli ol dek jaroj, la korea tablotenisa teamo faris sep amikajn vizitojn al nia lando kaj ankaŭ la ĉina tablotenisa teamo plurfoje vizitis

Koreion. Nun la koreaj tablotenisistoj venis al Ĉinio je la oka fojo kaj formis profundan batalan amikecon kun la ĉinaj sportistoj.

Apartan intimecon sentis la malnovaj kunbatalantoj je la revido. Ili tuj komencis interŝanĝi unu kun alia sian fratan senton kaj sperton en tablotenisa arto, kiel veraj samfamilianoj.

Je la 18-a de aŭgusto, la tablotenisaj sportistoj de la du landoj faris sian duan amikan prezentan maĉon en la Ĉefurba Sporta Halo. Antaŭ la komenco de la maĉo, ili kune faris ekzercadon, dum kiu ili faris alterne ekzercajn ludojn kaj interŝanĝon de sperto, en plena revolucia atmosfero de interhelpo kaj interlernado por kune levi sian tablotenisan nivelon. La tablotenisaj teamoj de la du landoj havas unu saman volon kaj unu saman celon, nome pluapaŝe fortigi la amikecon kaj solidarecon inter la du popoloj kaj inter la du sportistoj de Ĉinio kaj Koreio, pere de la trejnado kaj prezentaj maĉoj.

Komenciĝis la maĉoj! La kunbatalantoj marŝis en la ludejon ŝultro-ĉe-ŝultre kaj mano-en-mane, kaj ili longe, varme ĉirkaŭpremis unu alian.

Kaptite de la intensa atmosfero de frateco inter la ĉina kaj korea popoloj, la dudek mil spektatoroj en la halo varme aplaŭdis kiel ŝtormo.

Apenaŭ finiĝis la virina grupa prezenta maĉo korea tablotenisistino Ca Guan Suk vidis, ke ĉina sportistino Li Henan revenas de la ludotablo, kaj tuj iris renkonte al ŝi kun viŝtuko por forviŝi ŝian ŝviton. Mano-en-mane ili iris al seĝoj apud la ludotablo kaj sidiĝis. Tiam, la trejnistoj kaj sportistinoj de ambaŭ virinaj teamoj rapide sidiĝis proksime ĉirkaŭ ili kaj komencis babili intime. Li Henan diris al Ca Guan Suk: "Ĉi-vespere vi ludis tre lerte; je multaj ŝajne tre malfacile saveblaj kazoj vi sukcese rebatis la pilkon. Via ludo montris la revolucionan spiriton de braveco kaj persistemo de la korea popolo, kaj tio estas tre lerninda por ni." La alia tuj daŭrigis: "Kvankam ni povas trovi ĉe ni iajn bonajn punktojn, tamen troviĝas ĉe ni ankoraŭ multaj mankoj, pro kiuj ni devas bone lerni de vi."

Dum la tuta procezo de la amika maĉo, la ĉinaj kaj koreaj kunbatalantoj kaj la tuta spektantaro sentis senliman ĝojon pro la amikeco kaj solidareco

Intima babilo





Iu eŭropa amiketo esprimas sian varman amon al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ levante lian portreton.



Palestinaj knaboj studas verkon de Prezidanto Maŭ.

La Japana Ĵurnalista Unio kunsidis por studi la gravan skribaĵon de Prezidanto Maŭ dediĉitan al japanaj amikoj-laboristoj: **“Se oni nur efektive kombinas la universalan veron de Marksism-Leninismo kun la konkreta praktiko de la japana revolucio, do la japana revolucio sendube venkos.”**





Alte tenante pafilon en unu mano kaj *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong* en la alia, batalantoj de la Popola Liberiga Armeo de Dhofar esprimas ke ili direktos sian revolucionan praktikon per Maŭ-zedongpenso kaj firme kondukos la armitan batalon ĝis la fino.

Gerilaj batalantoj de la Zimbabve Afrika Nacia Unio studas la grandan penson de Prezidanto Maŭ pri "el la pafilo venas ŝtatpotenco".






Iu instruisto de la Laosa Pathet-Lao Milita Lernejo (dekstre) varme amas la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ kaj ofte studas liajn verkojn. Li diris: "Se ni bone studos verkojn de Prezidanto Maŭ, ni certe povos venki la usonan imperiismon."

Kolombia amikino legas verkojn de Prezidanto Maŭ.

Portugala maristo studas verkojn de Prezidanto Maŭ.



Fotoekspozicio pri Vjetnamio en Pekino

ESTIS okazigita en Pekino la Fotoekspozicio de la 25-a Datreveno de la Fondiĝo de la Vjetnama Demokratia Respubliko, kiu spegulas la grandajn venkojn de la vjetnama popolo en la kontraŭ-usona nacisava milito kaj en la socialisma konstruado kaj la grandan amikecon inter la popoloj de Ĉinio kaj Vjetnamio.

Pli ol kvardek tri mil personoj vizitis la ekspozicion. Dum rigardado la vizitantoj varme laŭdis, ke la vjetnama popolo estas popolo heroa, diligenta kaj kuraĝa, popolo brava kaj lerta en batalo. Sub la saĝa gvido de la granda gvidanto de la vjetnama popolo Prezidanto Ho Chi Minh kaj la Vjetnama Labora Partio, la vjetnama popolo maltimas perfortaĵon kaj sinoferon kaj senĉese fiaskigas agresajn militojn faritajn de imperiismo per revoluciaj militoj. Precipe en la lastaj pli ol dek jaroj, sur sia propra teritorio, la vjetnama popolo donis pezan baton al la usona imperiismo, la plej feroca en la nuna mondo, per tio ĵetis ĝin en teruran konsterniĝon kaj starigis brilan ekzemplon, ke “malforta lando povas venki fortan landon; malgranda lando povas venki

grandan landon”, kaj faris gravan kontribuon al la kontraŭimperiisma revolucia batalo de la tutmonda popolo. Ĉiuj vizitantoj esprimis, ke ili lernos de la heroa vjetnama popolo kaj salutas al la heroa vjetnama popolo.

“Inter Vjetnamio kaj Ĉinio ja profundas l’ amikeco: samideaneco plus frateco.” La revolucia amikeco kaj batala unuiĝo de la popoloj de Ĉinio kaj Vjetnamio, forĝitaj de la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ kaj la granda gvidanto de la vjetnama popolo Prezidanto Ho Chi Minh, senĉese firmiĝas kaj disvolviĝas en la batalo kontraŭ la usona imperiismo.

“La sepcentmiliono ĉina popolo estas potenca apogilo por la vjetnama popolo, kaj la vasta teritorio de Ĉinio estas fidinda postfronto de la vjetnama popolo.” Dum la vizitado la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj multfoje esprimis, ke ili subtenos la kontraŭusonon nacisavan militon de la popoloj de la tri hindoĉiniaj landoj per sia konkreta faro “teni la revolucion, stimuli la produkton, aliajn laborojn kaj preparon kontraŭ milito”.



Laboristoj de la Hanoja Maŝin-fabriko energie faras produktadon kaj akriĝas sian singardemon por bonvenigi la 25-an datrevenon de la fondiĝo de la Vjetnama Demokratia Respubliko.

Heroa Pafisto

EN la orienta regiono de la suda parto de suda Vjetnamio vaste cirkulas rakonto pri la faroj de la heroa pafisto de la 12-a taĉmento.

Disvolvante sian altan batalspiriton la batalantoj de tiu taĉmento faris brilajn meritojn en la milito. Ili detruis multajn malamikajn tankojn kaj kirasaŭtojn per bazukoj, ruinigis multajn malamikajn fortikaĵojn kaj pafpunktojn kaj ekstermis grandajn nombrojn da viva forto de la malamiko. Inter ili la juna batalanto Tran Minh Chinh detruis 14 tankojn kaj kirasaŭtojn per bazukoj en tri bataloj.

Matene de la 31-a de marto ĉijare, kiam la suno ĵus montris sin el post monto, malamikaj tankoj svarme venis al la pozicio de la 12-a taĉmento de la vojforko ĉe Ba Chiem. La fronta rekognoskisto raportis: "Estas jam videblaj la malamikaj tankoj!" La politika vicdirektanto ordonis atakon renkonte. La batalanto Duong Van Tien kun kesto da obusoj sur la ŝultro sekvis Tran Minh Chinh antaŭenirantan laŭ arbitaro por ataki la malamikon kune kun batalantoj de aliaj batalgrupoj. Tran Minh Chinh, kiu fikse kroĉis sian rigardon al furioze pafanta malamika tanko M-41, subite ekpafis ĝin. Jen tiu moviĝanta ŝtalaĵo estis envolvita de fajro kaj fumo post kelkaj moviĝetoj. Tiutempe la malamikoj sur kirasaŭto M-113 ĉe la dekstra flanko trovis celon kaj koncentris siajn pafojn al Tran Minh Chinh. Ĝuste en tiu tempo Tran Minh Chinh jam rapide saltis post alian arbego kaj metis novan obuson en la pafubon. En la momento, kiam lia fingro premis la ĉanon, aŭdiĝis tondro kaj la malamika kirasaŭto estis elstrekita.

"Ni jam detruis du malamikajn militĉarojn!" Tran Minh Chinh ĝoje raportis al politika direktanto.

Rigardante ĉion okazintan sur la batalkampoj la

lasta ĝoje ordonis montrante la malamikojn: "Kaptu firme la voston de la malamikoj!"

Per lerta movo Duong Van Tien donis unu obuson al Tran Minh Chinh kaj enmanigis al si alian. Ambaŭ fluge sturmis antaŭen. Ankaŭ aliaj batalgrupoj intense pafis kontraŭ la malamikoj.

La batala formacio de la malamikaj militĉaroj estis malordigita. Ĥaoso da pafoj bruis. Tran Minh Chinh kaj lia helpanto daŭre alproksimiĝis al la malamikoj. Tra arbitaro ili vidis alian vicon da malamikaj militĉaroj. Kiam tiuj venis en la trafdistancon, per du pafoj Tran Minh Chinh trafte detruis du el ili.

Tiam restis al Tran Minh Chinh nur unu obuso, kiun li zorge ŝargis en bazukon kaj kun la aprobo de la politika direktanto pafis kontraŭ malamika kirasaŭto M-113 en distanco de 40 metroj kaj ĝin detruis.

En tiu batalo la malamiko estis batita ĝis paniko. La unuan fojon tiu juna batalanto uzis bazukon kaj per kvin pafoj detruis kvin malamikajn tankojn kaj kirasaŭtojn kreante brillan meriton en la batalo.

Ok tagojn poste, la 12-a taĉmento al kiu apartenis Tran Minh Chinh, estis ordonita ataki la usonan trupon okupantan la montpinton n-ro 95. En tiu batalo, estis ekstermitaj 300 usonaj soldatoj, detruitaj 37 militaj ĉaroj kaj 10 paflegoj, kaj faligitaj 4 aviadiloj de la malamiko. Kaj Tran Minh Chinh detruis 3 malamikajn kirasaŭtojn kaj 1 malamikan pafpunkton per 4 obusoj.

En majo ĉijare, kiam en la tuta armeo leviĝis la konkurso de malamik-ekstermo "por krei grandegajn militmeritojn kiel dankesprimon al la bonfaroj de onklo Ho Chi Minh en spirito de nepra venko super la usonaj agresantoj per decidema batalo",



Batalantoj de la Sudvjjetnamaj Popolaj Liberigaj Armitaj Fortoj furas, ke ili forte batos la agresantojn kaj kondukos la kontraŭuson nacisavan militon ĝis la fino.

Tran Minh Chinh ree kreis brilajn militmeritojn.

Iun tagmezon, roto de la 11-a kirasita regimento de la usona armeo trudiĝis en la pozicion de la 12-a taĉmento. La komandanto ordonis sinpretigon al batalo. Duong Van Tien donis al Tran Minh Chinh unu obuson kun admono: "Chinh, bone celu antaŭ ol pafi!" La lasta flugrapide kuris post iun arbegon 20 metrojn fore, antaŭ ol li havis tempon por respondi. Tiam, la malamikaj militaj ĉaroj jam plene sin montris sur la vastejo kaj unu el ili estis eksplodigita trafite. Tran Minh Chinh tuj kaptis la favoran momenton, direktis sian bazukon kontraŭ iun kirasauton kaj detruis ĝin per subita pafado.

Konsternite de subita atako, la malamikoj plentempe pafis sencele kontraŭ la arbitaro kaj samtempe petis helpon de aviadiloj kaj longdistancaj kanoj. Post kiam unu malamika helikoptero atakis blinde la ĉirkaŭaĵon de la pozicio de la Liberiga Armeo dum certa tempodaŭro, la malamikaj kirasautoj ree komencis sian alpuŝigon. Tran Minh

Chinh fikse sekvis la malamikajn kirasautojn per akra rigardo kaj detruis du el ili per du obusoj en daŭro de 15 minutoj.

En posttagmezo de la sama tago, ree venis la malamikaj tankoj kaj kirasautoj. Kun malamego, Tran Minh Chinh pafis obuson kontraŭ la fronta tanko de tipo M-41. Tuj la tanko ekbrulis kun flamoj, kaj la malamikoj ĝin sekvantaj ne kuraĝis alproksimiĝi kaj nur blinde pafadis per pafilegoj. Unu ŝrapnelo eksplodis sur loko je 4 metroj fore de Tran Minh Chinh. Li trovis ke sangas liaj fingroj kaj frunto. Malgraŭ tio li ankoraŭ ŝargis sian bazukon per alia obuso kaj detruis alian malamikan "feran testudon".

En tiu batalo Tran Minh Chinh detruis sume 6 malamikajn tankojn kaj kirasautojn. Tiamaniere li en sinsekvaj bataloj sin montris elstara pafisto, daŭre faris brilajn militmeritojn kaj aldonis novan brilon al la glora tradicio de kuraĝa batalemo de sia trupunu.

La Revoluciaj Flamoj Neestingebblaj



Firme tenante sian pafilon la juna palestina gerilano estas preta por ekstermi la usonajn kaj izraelajn agresantojn en ĉiu ajn tempo.

JE la tagiĝo de la 17-a de septembro, 1970, la prousonaj reakciaj fortoj de Jordano senkaŝe ekspedis grandan nombron da trupoj, kiuj sub la ŝirmo de tankoj kaj kanona fajro faris frenezajn atakojn kontraŭ la palestinaj gerilanoj, kun intrigo per unu bato ekstermi la revoluciajn armitajn fortojn de la palestina popolo. Alfrontante tian seriozan cirkonstancon, la palestinaj gerilanoj devigite leviĝis por sindefendo, firme repuŝante la armitajn atakojn de la malamiko.

La palestinaj gerilanoj estas grava forto de la arabaj popoloj en la batalo kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝia agresa instrumento la izraelaj cionistoj. En la lastaj kelkaj jaroj, la usona imperiismo kaj ĝiaj komplotuloj streĉis la cerbon por ĝin ekstermi intrige. Unu el la krimaj celoj de la "Rogers-plano" elmetita de Nixon-registaro en junio de la kurlanta jaro por "pace solvi" la mezorientan problemon estas splitigi la unuiĝon inter la palestina kaj aliaj

arabaj popoloj por pluapaŝe strangoli la palestinan revolucion.

La lastatempa ŝanĝiĝo de la politika situacio de Jordano estas nedisigebla kun tiu intrigo de la usona imperiismo. Ĝuste kiam la jordanaj reakciaj fortoj lanĉis furiozajn atakojn al la palestinaj gerilanoj, la sekretario de defendo de Usono Laird kriaciis freneze ke la usona sesa floto jam alproksimiĝis al la "mezorienta zono". La proparolanto de la usona ŝtata departemento eĉ senkaŝe deklaris, ke la ebleco de la usona milita interveno en Jordanon ne povas esti esceptita. En la sama tempo, Nixon-registaro plifortigis la usonan aeran forton en turkiaj bazoj por fari militan minacon al la palestina kaj aliaj arabaj popoloj. Ankaŭ la izraelaj agresantoj amasigis trupojn ĉe la okcidenta bordo de Jordanrivero, kaj estas pretaj por agado. Multaj faktoj montris, ke la usona imperiismo kaj ĝia lakeo Izraelo estas koluziantaj kun la prousonaj reakciaj fortoj

en arabaj landoj kun vana provo ekstermi la revoluciajn armitajn fortojn de la palestina popolo por pavimi la vojon por antaŭenpuŝi la intrigon de "mezorianta Munĥeno".

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris: "Levi ŝtonegon kaj ĝin faligi sur siajn proprajn piedojn" estas ĉina popoldiro por priskribi la konduton de iuj stultuloj. La reakciuloj en diversaj landoj ĝuste estas stultuloj de tia speco. Iliaj diversaj persekutoj kontraŭ la revoluciaj popoloj, en la fina analizo, servas nur por akceli la popolan revolucion al pli vasta kaj pli intensa skalo."

La palestina popolo estas brava kaj nesubigebla, ĝi decidis batali ĝis la fino por plena venko de la naciliberiga afero de Palestino. La armita subpremado de la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj ne nur ne povos estingi la furiozajn revoluciajn

flamojn de Palestino, sed male forĝos la palestinan popolon pli firma kaj puŝos la batalon de la arabaj popoloj kontraŭ la usona imperiismo al pli alta tajdo, tiel ke la batalo portos pli grandan fiaskon al la usona imperiismo. La batalo de la palestina popolo ne estas izolita, ĝi gajnis la subtenon de la popoloj de la arabaj landoj kaj de la tuta mondo. En la 21-a de septembro, 1970 la registaro de la Ĉina Popola Respubliko publikigis deklaron, en kiu ĝi en la nomo de la sepcent-miliona ĉina popolo firme subtenas la justan batalon de la palestina popolo kaj aliaj arabaj popoloj. Ni forte konvinkigis, ke se nur la palestina popolo kaj aliaj arabaj popoloj plifortigos sian unuigon kaj persistos en la batalo, ĉiuj intrigoj de la usona imperiismo estos frakasitaj, kaj la fina venko certe apartenos alla palestina popolo kaj aliaj arabaj popoloj.

(JEN PING)

Bravaj palestinaj gerilanoj transvadas Jordan-riveron por forte bati la malamikojn.





Granda Manifestacio de 30,000 Popolanoj en la Ĉefurbo de Sirio

Heroa Rebato al Atakoj de la Reakciaj Fortoj de Jordano

La reakciaj fortoj de Jordano, subinstigataj kaj subtenataj de la usona imperiismo, eklanĉis frenezajn atakojn al la palestinaj gerilanoj je la mateniĝo de la 17-a de septembro. La palestinaj gerilanoj kaj milicianoj brave leviĝis por sindefendo heroe rezistante kontraŭ la atakoj.

En la du sinsekvaj tagoj de la 17-a kaj 18-a, la jordanaj reakcia armeo ekspedis grandan nombron da kirastrupoj, kiuj, sub la ŝirmo de tankoj kaj kanona fajro, faris grandskalajn atakojn al la bazoj de la palestinaj gerilanoj en Amman kaj ĝiaj antaŭurboj. Brave batalante, la gerilanoj kaj milicianoj nur en la tendaro Vehdat en la suda antaŭurbo de Amman jam ekstermis ĉ. unu tutan roton de la atakanta jordanaj trupo kaj detruis 16 tankojn kaj kirasaŭtojn. En la 18-a, la jordanaj reakciaj fortoj ekspedis aldonajn trupojn por plifortigi sian ofensivon. Ili eĉ uzis fosforajn kaj napalmajn obusojn provizitajn de la usona imperiismo. La heroaj palestinaj gerilanoj kaj milicianoj persiste tenis siajn poziciojn, kaj ĉiuj atakoj de la jordanaj trupoj trafis fiaskon.

En la 18-a, la jordanaj kirasitaj trupoj faris atakojn al Kassarat, Ramtha kaj Turra laŭlonge de la Ŝoseo Damask-Amman. Ankaŭ tiuj atakoj estis repuŝitaj de la gerilanoj. La gerilanoj en Kassarat detruis 6 tankojn de la jordanaj trupoj. En la sama tago, en Aĝlun, nordokcidente de Amman, 6 oficiroj de la jordanaj tera armeo inkluzive la estron de la "Brigado de Husejn" kaj la estron de inĝeniera regimento transiris al la flanko de la palestinaj gerilanoj, kun granda nombro da soldatoj sub sia gvido.

La perfidaj atakoj fare de la jordanaj reakciaj fortoj al la palestinaj gerilanoj certe renkontos hontindan fiaskon!

Por protesti kontraŭ perfortaĵoj farataj de la reakciaj fortoj de Jordano subtenataj de la usona imperiismo por subpremi la palestinajn gerilanojn, en la 18-a, 30,000 popolanoj de Sirio okazigis potencajn manifestacion kaj mitingon. En sia parolo ĉe la mitingo ŝtatestro de Sirio Nureddin Atassi montris ke "la masakroj nun en Jordano" "estas rezulto de la 'rezolucio' de la 'Konsilantaro de Sekureco de UNO' kaj la 'Rogers-plano'".

Je la antaŭtagmezo de la 18-a, 30,000 laboristoj, kamparanoj, junuloj, virinoj kaj palestinaj gerilanoj okazigis manifestacion, gvidatan de palestina flago. La manifestaciantoj laŭte kriis la sloganojn por subteni la armitan batalon de la palestina popolo, por oponi la maŝinaciojn de la usona imperiismo, "pacan solvon" de la mezorienta problemo kaj la jordanajn reakciajn fortojn pro iliaj masakroj al palestinaj gerilanoj kaj amasoj.

Post la manifestacio oni okazigis mitingon.

Manifestacioj de la Iraka kaj Libana Popoloj

En la 18-a, la irakaj kaj libanaj popolanoj okazigis manifestaciojn respektive en Bagdado, la ĉefurbo de Irako, kaj en Tripoli, urbo en la norda parto de Libano, indigne kondamnante la usonan imperiismon pro ĝia krimo subinstigi la jordanajn reakciajn fortojn subpremi la palestinajn gerilanojn.

La manifestaciantaj amasoj unuvoĉe kaj indigne kondamnis la usonan imperiismon kaj ĝiajn lakeojn pro ilia intrigo kontraŭ la palestina revolucio kaj pro ilia damninda krimo masakri palestinajn gerilanojn.



Cent mil homoj de Bagdado, la ĉefurbo de Irako okazigis manifestacion indigne kondamnante la kriman intrigon de la usona imperiismo, kiu provas estingi la armitan batalon de la palestina kaj aliaj arabaj popoloj.

Ili unuanime esprimis, ke ili tuforte subtenas la palestinajn gerilanojn en ilia batalo kontraŭ la agresado de la usona imperiismo kaj Izraelo por liberigi sian hejmlandon.

Proklamo de Libio pri Ĉesigo de la Financa Helpo al Jordano

Sekve de la armitaj atakoj lanĉitaj de la jordanaj reakciaj fortoj kontraŭ la palestinaj gerilanoj sub la

instigo de la usona imperiismo, la Libia Revolucia Komandanta Konsilantaro faris deklaron en la 18-a de septembro, proklamante la decidon ĉesigi sian financon helpon al Jordano.

La deklaro montris, ke en konsidero de la bedaŭrindaj eventoj en Jordano kaj pro "la provoj por forviŝi nian palestinan revolucion, la Libia Respubliko decidis ĉesigi sian financon helpon al Jordano por eterne."



Kiel Agu Ĥirurgo

MI servas kiel kuracisto en iu trupo de ĈPLA. En decembro de 1969 la organizo sendis min al iu hospitalo de Ŝanhajo por lerni tie ĥirurgion. Post mia alveno, ĉiuj en la hospitalo montris al mi grandan zorgemon kaj multaj kuracistoj konkure helpis min por posedi la ĥirurgian teknikon. Foje, dum operaciado iuj ĥirurgoj instigis min profiti la okazon por palpi la abdomenajn internaĵojn de la malsanulo por ekkoni la internan strukturon de homa korpo. Mi dubis, ĉu tio ne malutilos al la malsanulo. Mi do demandis: “Ĉu tio ne kaŭzos ian suferon al la malsanulo?” “Tre verŝajne ĉiuokaze”, ili diris. Kaj mi denove demandis: “Ĉu la mano, kiu ĵus tuŝis la korpon de la paciento dum operacio, ne enportos tiamaniere bakterion?” “Eble,” ili respondis. “Kial do ni tion faru, se tio malutilas al la malsanulo?” mi diris. Ili respondis, ke iliaj instruistoj ĝuste tiel ilin instruis antaŭe.

Tia instrua metodo de la burĝaro tre indignigis min. Mi pensis, ke eĉ sana homo sentas doloron en la interno, se oni forte premas lian korpon de ekstere. Kian plian suferon kaŭzos al la operaciato la rekta tuŝo de liaj internaĵoj! Krome, estos eble enportitaj bakterioj! Mi do diris al tiuj kuracistoj: “Pensi nur pri lernado de tekniko sen konsidero pri suferoj de malsanuloj, tio tute estas agmaniero de la burĝaro. Mi ne povas tion fari!” Post tio mi kune kun ili studis la instruon de Prezidanto Maŭ “**la problemo por kiuj estas problemo fundamenta, problemo de principo**” kaj kritikis tian instruan metodon. Tio multe ŝokis la ĥirurgojn kiuj bonvole instruas min, kaj ili diris kun doloro en la koro: “Ni estis tro profunde venenitaj antaŭe de la burĝaraj manieroj.” Tuj sekve ni kune disvolvis revolucion amasan kritikon kontraŭ tiaj instruaj metodoj kaj likvidis ilin kaj aliajn similajn lernometodojn.

En la kuraca praktikado mi profunde sentis, ke kvankam la burĝaro estas faligita, sed ĝia ideologio ankoraŭ ne estas entombigita, nek eliminata ties venena influo en la kuracaj kaj higienaj sferoj. Tial, la proletaro povos firme okupi la pozicion de kuracado kaj higieno nur en la kondiĉo, ke ĝi persiste observas kaj reformas ĉion per Maŭzedongpenso.

Ekzemple, mi rimarkis, ke ĥirurgoj kiuj instruis al mi operaciadon, ĉiam faris sufiĉe longan tranĉon. Kiam mi demandis pri la kialo, ili respondis, ke tio ebligas plenan malkovron de la malsana parto, klaran vidon kaj glatan operaciadon. Komence ankaŭ mi tiel faris en kelkaj kazoj. Sed ju pli mi tiel faris, des pli kreskis al mi skrupulo. Mi pensis, ke longa tranĉo oportunas nur por ĥirurgo, sed ĝi pliigas suferojn al la malsanulo. Finfine, kiu servu al kiu, ĉu la ĥirurgo al la malsanulo por senigi liajn suferojn, aŭ la malsanulo al la ĥirurgo por doni al li oportunecon? Ju pli mi pensis pri la afero, des pli mi sentis ke tia agmaniero malfavoras al la malsanulo kaj ne konformas al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Mi do studis la instruon de Prezidanto Maŭ “**servi al la popolo**”, kritikis la pure teknikan vidpunkton de la burĝaro kaj decidis plibonigi la tranĉmanieron kune kun la medicinaj laborantoj. Unue mi komencis la provadon en kazo de fortranĉo de apendico. Elirante el la reala stato de la malsanulo, mi faris signon sur lia plej dolora loko per metilviolo kaj dum operaciado faris malgrandan entranĉon sur la signo. Tiamaniere, ĉiufoje mi povis tuj trovi la apendicon post la tranĉo kaj facile sukcesis ĝin fortranĉi. Pro malgranda aperturo, la doloro de la malsanulo multe reduktiĝis kaj pli rapide kuniĝis la tranĉbuŝo. Tiel, ankaŭ aliaj kuracistoj faris klopodon por plibonigi la manieron de entranĉo por diversaj kazoj, kaj tio estas tre bonvena al la malsanuloj.

Nelonge post mia veno al la hospitalo, okazis pinto-kontraŭ-pinta batalo pri kuraco de gambo de iu malsanulo.

La malsanulo nomiĝas Giang Kian. En 1964 li eksuferis de angiito. En ses jaroj lia malsano pli kaj pli graviĝis. Sur lia maldekstra gambo estis grandarea ulcero, sur lia gluteo lin turmentas kuŝvundo kun grandeco de telero, kaj kontinua alta febro nebuligis lian menson. Specialistoj de pluraj hospitaloj multfoje faris kunan ekzamenon pri lia malsano kaj konkludis unuanime la necesecon de "altloka amputo de la gambo". Iu ostologo eĉ arbitre asertis: "Tio estas tipa septicemio. Se oni ne forsesos al li la gambon, li mortos en tri tagoj." La hospitalo dufoje faris "sciigon pri vivdanĝero de la malsanulo". Ĉar la malsanulo ne konsentis, la operacio ne povis esti farita. Vidante la suferojn de la paciento kaj memorante la instruon de Prezidanto Maŭ "**nia devo estas respondeci al la popolo**", mi demandis iun kuraciston: "Ĉu estas eble resanigi la malsanulon sen forsego de la gambo?" Li diris: "Laŭdinda estas via varma koro, sed vi ne scias, ke angiito estas malfacile kuracebla malsano. La sola rimedo kontraŭ ĝi estas plene forsegi la membron ĝis la loko difektita inkluzive." Mi dubis, ĉu vere ne troviĝas alia rimedo ol tio. Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ "**ĉiuj konkludoj naskiĝas post enketado**", mi faris atenteman observadon al la malsanulo kaj trovis ke la konkludo de tiuj "aŭtoritatuloj" ne konformas al la reala stato. Ekzemple, la ĉefa bazo de ilia antaŭdiro pri morto de la malsanulo "en tri tagoj" kaj "tipa septicemio" estas multa leŭkocitnombro. Fakte, ekde septembro de 1969 la leŭkocitnombro de la malsanulo ĉiam pli kreskis kaj ĝis nun jam pasis 7-8 monatoj en tiu stato. Tio signifas ke la kaŭzo ne estas septicemio. Laŭ analizo de diversaj statoj mi proponis kuraci tiun malfacile kuraceblan malsanon per medikamentoj anstataŭ operacio.

La propono tuj estigis disputon. Iu mokis: "Han Jufen ja volas surgrimpi altan montpinton de la mondo kaj krei miraklon!" Ankaŭ iuj zorgeme demandis al mi: "Ĉu vi havas certecon kuraci tiun malsanon?" "Kvankam mia tekniko estas



Kamaradino Han Jufen (la unua de dekstre) studas verkon de Prezidanto Maŭ kune kun la sanigita resuferanto de kancero.

malalta," mi respondis, "tamen kiel revolucia batalanto mi ne devas halti senfare pro tio."

Kune kun la kamaradoj mi studis koncernajn instruojn de Prezidanto Maŭ por plenenergie trovi la ĉefan kontraŭdiron de la kazo. Post analizo ni konkludis, ke la ĉefa kontraŭdiro estas la ekzisto de puso interne kiu kaŭzas al li febron kaj leŭkocitozon, ni do decidis unuapaŝe eligi puson kaj senigi inflamon. Mi detale ekzamenis la supraĵon de la ulcero kaj faris la unuan kuracon, kiu donis iom post iom efikon.

Post kuracado de pli ol du monatoj malpliĝis la febro de la malsanulo, klariĝis lia menso kaj normaliĝis iom post iom la hemogramo (sistema raporto pri trovaĵoj el sanga ekzameno). Sed aperis nova kontraŭdiro: Kiam formiĝis novaj

karno kaj nervoj ĉe la ulcero, tio tre doloris al la antaŭe sensenta gambo. Tiam iu diris, ke la doloro montras malgrandan efikecon en la kuracado. Iu eĉ avertis: "Se oni ne tuj faros operacion, la malsano pli graviĝos kaj minacos la vivon de la malsanulo." Tamen, mi tute ne malkuraĝiĝis, ĉar mi opiniis normala la doloron kaŭze de la formiĝo de novaj karno kaj nervoj. Tiu doloro estas bona fenomeno kaj estas tute malsama ol la doloro kaŭzita de daŭra nekrozo antaŭe. Firme kritikinte la eraran opinion pri fortranĉo de gambo, mi kune kun la vasta amaso de revoluciaj kuracistoj kaj flegistinoj aktive propagandis Maŭzedongpenson al la malsanulo kaj liaj familianoj kuraĝigante ilin "fari firman decidon, timi nenian oferon, superi ĉiujn malfacilojn por akiri venkon". Dank' al subteno de la vasta amaso kaj aktiva kunago de la malsanulo, post apliko de serio da kuracaj rimedoj plene reformiĝis la karno kaj haŭto sur la malsana gambo kaj tiu preskaŭ fortranĉita gambo fine resaniĝis. Tio estas venko de la proletara kuraca kaj higiena linio de Prezidanto Maŭ.

La kuraca praktikado estas ankaŭ procedo de batalo kontraŭ la burĝara kuraca kaj higiena linio. Mi profunde sentis, ke oni havas plej grandan kuragon kaj saĝon, nur se oni sekvas la instruon de Prezidanto Maŭ firme unuiĝi kun amasoj kaj batali kune kun ili.

En la kvara de majo ĉijare, la hospitalo akceptis malsanulinon Vu Ajĝen, kiu resuferis kanceron. En la pasinta jaro ŝi suferis kojlokanceron kaj post operacio ĝi reaperis sur ambaŭ ovarioj. Ŝi vizitis kelkajn hospitalojn. Oni diris al ŝi: "La reapero de kancero montras ke ĝi jam venas al la posta periodo kaj estas nekurablebla." Do neniu hospitalo ŝin akceptis, kaj ĉiam pli kreskis la kancero, tiel ke ĝi alte elstariĝis en la abdomeno kaj ŝi ruliĝadis tuttage sur la lito pro dolorego. Nia hospitalo akceptis ŝin, sed tio, kion ni faris, estis nur injekto de morfino kaj aliaj narkotaĵoj. Tio fakte estas atendo de la veno de ŝia morto.

Mi tre ĉagreniĝis, rigardante ke la kancero tiel turmentas la klasan fratinton ĝis morto. Kun iometo da espero mi kaj kamaradoj de ĥirurgia fako decidis akompani ŝin al alia hospitalo por fari kuran ekzamenon. Sed post la ekzameno, oni konkludis ke nenio estas farebla.

En tiu ĉi okazo, inter la medicinaj laborantoj estiĝis akra malakordo pri la problemo, ĉu oni tamen faru operacion por savi ŝin lastprove. Iuj firme malaprobis operacion. Mi kaj aliaj kamaradoj

serioze analizis la realan staton de la malsanulino: kvankam la malsanulino suferis kanceron dum relative longa tempo, tamen ŝia apetito kaj korpostato estas kompare bona. Tial ni opiniis, ke operacio kvankam estas iom riska, tamen ne tute senespera. Por savi la klasan fratinton, ni devas riski la 99% da malsukceso por realigi la 1% da espero. Ni do decideme pledis por fari operacion.

Sed kiel fari la operacion? Mi rememoris la kazon de kuracado de Giang Kian, dum kiu ekzistis elstara manko: la amaso ne estis plene mobilizita. Prezidanto Maŭ instruas al ni: "En ĉiu ajn laboro necesas amasa movado, sen kiu oni sukcesas en nenio." Mi pensis, ke ĉifoje ni devas akcepti la lecionon kaj plene mobilizi la amason, por kune savi kamaradon Vu Ajĝen el morto per komuna klopodo. La gvidantoj de la hospitalo tre subtenis mian ideon.

Fakte, la amaso ja estas vera heroo. Kiam la vasta revolucia personaro de la hospitalo estis mobilizita, ili elpensis multajn bonajn metodojn, ellaboris tri operaciajn projektojn kaj serion da garantiaj aranĝoj kontraŭ eventualaĵoj. Sub tiaj kondiĉoj, ni difinis detalan projekton pri operacio, narkotado kaj flegado kaj ellaboris diversajn projektojn kontraŭ urĝaj eventualaĵoj kaj provizado de bezonaĵoj. Ankaŭ multaj frataj unuoj nin multe helpis. Direktate de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, ni uzis nur du horojn por sukcese plenumi la operacion kaj elprenis du kancerajn kun suma pezo de pli ol 3 kilogramoj. Kiam la malsanulino rekonsciiĝis, kun varmaj larmoj en la okuloj ŝi emocie kriis: "Vivu Prezidanto Maŭ!"

Por efektiviĝi la proletaran higienan linion de Prezidanto Maŭ kaj servigi la kuracan kaj higienan laboron pli bone al la vasta laboranta popolo, dum mia lernado en la hospitalo, mi persiste utiligis postlaborajn tempojn por viziti malsanulojn, kies hejmo estas en proksimeco. Kiam mi proponis starigi la sistemon de vizito al certaj proksime loĝantaj malsanuloj por fari kuracon, la gvidantoj de la hospitalo tuj ĝin akceptis. Nun tiu hospitalo jam havas pli ol cent tiajn klientojn, kiuj ne bezonas persone veni al la hospitalo kaj tiu aranĝo trovis varman bonvenigon inter la amasoj.

Mi jam decidus ankoraŭ pli bone studi estonte la grandan teorion de Prezidanto Maŭ pri daŭra revolucio sub la proletara diktaturo, senĉese levi mian konscion pri klasbatalo kaj batalo inter la du linioj kaj batali por defendi la proletaran kuracan kaj higienan linion de Prezidanto Maŭ dum la tuta vivo.

Novaj Homoj kaj Aferoj

sur la Stepo

EN la alta firmamento ŝvebas lanugaj nuboj kaj la vasta stepo de Interna Mongolio sin etendas al nevidebla forajo. Sur la stepo moviĝas gregoj de grasaj ŝafoj. Ĉie aŭdiĝas gajaj kantoj. Sur la senlime vasta herbejo regas vicleco kaj viveco.

Nun ĉie sur la stepo de Interna Mongolio vi povas aŭdi rakontojn pri laŭdindaj homoj kaj aferoj.

Iun printempan vesperon de 1967, reveninte hejmen post paŝtado, Vang Ĉanglin, maljuna ŝafpaŝtisto sur la herbejo Uburun aŭdis ke en la sidejo de la komunumo oni alportis kvanton da *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*. Li tre ĝojiĝis, tuj iris tien en la sekvinta frua mateno kaj aĉetis unu ekzemple-

ron post piedirado de pli ol 15 kilometroj. Ekde tiam li lernis la vortojn de Prezidanto Maŭ dum paŝtado kaj konsultis preterpasantojn se li renkontis nekonatajn vortojn. Vespere post paŝtado li petis por sia lernado helpon de intelektaj junuloj venintaj por fiksloĝi. De la lastaj tri jaroj, li ne nur povas parkere citi multe da eldiroj de Prezidanto Maŭ, sed ankaŭ povas agi rigore observante la normon de "ekskluziva" kaj "senrezerva" servo al la popolo.

En la pasinta printempo, konsiderante, ke li estas maljuna kaj malforta, la brigada revolucia komitato decidis asigni al li malpezan laboron. Sed informiĝinte pri tio, Vang Ĉanglin tre maltrankvili-

Anoj de Ĉahanniaŭ-brigado de Vuŝengĝaŭ-komunumo draŝas tritikon.



gis. Li iris al brigadestro Bandgar kaj diris al li: "Prezidanto Maŭ instruas, ke ni devas nin dediĉi 'ekskluzive' kaj 'senrezerve' al la revolucio, kiel do mi povas demeti la paŝtistan vipon?" Li daŭre paŝtis la ŝafaron kaj ĉiutage kunportis kun si jutsakon kaj vespere revenis kun la sako plena de herbo. En la pasinta aŭtuno li kolektis kelkajn milojn da ĝinoj da herbo por la produkta grupo.

Vang Ĉanglin tutjare laboradis peneme sur la herbejo malgraŭ vento kaj pluvo kaj neniam plendis pro laciĝo. Por bone paŝti la ŝafaron de la kolektivo, li donis nenian zorgon pri si mem. En iu vintra frua mateno de la pasinta jaro, li elpelis la ŝafaron en tranĉa frostoj kaj neĝado. Posttagmeze, subite ŝanĝiĝis la vetero. Ekblovis fortega vento kaj la temperaturo falis abrupte ĝis 30° C sub la nulo. La konsternita ŝafaro kuregadis laŭ la vento. Li proksime sekvis la ŝafaron kaj la furioza vento ĵetadis al lia vizaĝo neĝblokojn kaj sablerojn. Post nelonge, lia tuta korpo estis plene kovrita de glacio kaj liaj ambaŭ piedoj sensentiĝis pro malvarmego. Subite li falis en neĝamason. En tiu tempo li ekmemoris kamaradon Ĝang Side menciitan en la verko *Servu al la Popolo* kaj tuj pleniĝis je energio. Li decidis protekti la ŝafaron per ĉia rimedo eĉ se por tio li devos oferi sian vivon. Li stariĝis post baraktado kaj kuris post la ŝafaro kunpremante la dentojn. Li denove falis kaj denove levigis por daŭ-

rigi la postkuradon. Kun la neĝa ŝtormo li luktadis unu tagnokton kaj sukcese defendis la kolektivajn ŝafaron.

Ĉe la norda landlimo de Interna Mongolio troviĝas produkta grupo Haraus. Ĉi tie ĉirkulas inter la popolanoj rakontoj pri la progresemaj faroj de paŝtistino Bajan-ceceg, aktivulino de studo de verkoj de Prezidanto Maŭ en viva studo kaj viva apliko de la "tri popularaj artikoloj".

Bajan-ceceg estis infano de mizeruloj. Kiam ŝi estis 10-jara, ŝia patro mortis sub la vipo de princo, kaj kiam ŝi estis 12-jara, ŝi jam komencis paŝti kune kun sia patrino ŝafojn de riĉulo-brutposedanto. Estas la popola liberiga armeo gvidata de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kiu savis Bajan-ceceg el la maro de mizeroj de la malnova socio.

La liberigita Bajan-ceceg havas profundan proletaran amon al Prezidanto Maŭ. Ŝi prenas la studon de verkoj de Prezidanto Maŭ kiel primaran aferon de sia ĉiutaga politika vivo. Kiam ajn laciĝon ŝi sentis post taga laboro, ĉiun vesperon ŝi petis sian filineton Tokson voĉlegi por ŝi verkojn de Prezidanto Maŭ.

Foje, la produkta grupo decidis aparte bredi pli ol 20 malfortajn bovojn el la grego. Sciiginte pri tio, Bajan-ceceg meminiĉiate prenis sur sin la peni-

Taĉmento de milicianoj sur la dezerto Maŭvusu





Baŭjiledaj (la unua de maldekstre en la antaŭa vico), eminenta komunistino kaj estrino de la revolucia komitato de Vuŝenĝaŭ-komunumo, kaj ĝiaj membroj studas perspektivan projekton por transformi la dezerton.

gan taskon. Ŝia filineto Tokson ne komprenis kial ŝia patrino volonte prenis por si malfacilan laboron. Bajan-ceceg petis la filineton voĉlegi atente la brilan verkon de Prezidanto Maŭ *Memore al Norman Bethune*. Post legado ŝi diris: “Prezidanto Maŭ instruas al ni ke por la revolucio oni devas preni al si pezajn laborojn kaj lasi la malpezajn al aliaj, alie kio estas kompleta sindono al aliaj sen ajna konsidero pri si mem?”

Bajan-ceceg kondukis la bovojn en sian hejmon kaj zorge bredis ilin. Tage ŝi pelis la gregon al plej sukoplana herbejo kaj vespere donis al la bovoj medikamenton kaj furaĝon, kaj ŝi persistadis en tio. Bajan-ceceg suferis de kronika apendicito kaj la brigada revolucia komitato multfoje urĝis ŝin enhospitaliĝi, sed ŝi pensis: Nun en la grupo estas multe da laboroj kaj la grego ankoraŭ ne grasiĝis, ĉu mi povus forlasi la laboron? Ĉar ŝi ne volis enhospitaliĝi, la kamaradoj de la brigada revolucia komitato admonis ŝin bone zorgi sian sanon. Sed ŝi ofte neglektis sian ripozon pro la laboro. Ŝi tamen klare memoris, de kia malsano la bovoj suferas kaj kian medikamenton ili devas preni.

Iun matenon, Bajan-ceceg pelis la gregon al Hoŭŝan-paŝtejo. Tie ŝi vidis komunumanojn streĉe elfosantajn terpomojn, ŝi tuj prenis fosilon kaj eklaboris. Post nelonge, Bajan-ceceg eksentis doloron je la ventro kaj sur ŝia frunto ruliĝis dikaj ŝvitgutoj. Aliaj tuj sendis ŝin en la komunuman hospitalon kaj

post diagnozo kuracistoj amputis al ŝi la apendicon. Post la operacio Bajan-ceceg rekonsciiĝis kaj kriis: “Vivu Prezidanto Maŭ!” La ĉirkaŭantoj forte emociiĝis kaj laŭdis: “Bajan-ceceg vere estas homo kia priskribita en la ‘tri popularaj artikoloj!’”

La maljuna paŝtisto Liu Ĝu estas intime nomata de la komunumanoj de Ŝibaŭ-komunumo kiel “Maljuna Malsaĝa Avo” sur la stepo.

Liu Ĝu estas aktivulo de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso. Multajn jarojn li paŝtis ŝafojn por la kolektivo.

Ĉiujare en la sezono de nasko de ŝafidoj, li paŝtas ŝafojn tage kaj flegas naskantajn ŝafinojn vespere. La ĵus naskitaj ŝafidoj timas malvarmon, li do metis ilin sur sian varman brikleton kaj kovris ilin per vatita litkovrilo. Foje, kelkaj ŝafidoj malsaniĝis. Laŭ sia multjara sperto li aĉetis per sia propra mono drogherbojn. Li prenis la ŝafidojn en la sinon kaj enbuŝigis al ili dekoktajon kuleron post kulero. Ankaŭ nokte li ne forlasis la ŝafidojn kaj zorge flekis ilin ĝis resaniĝo kaj nur tiam trankviliĝis lia koro. De kelkaj jaroj, pli ol 98% el la ŝafidoj de li paŝtataj kreskis ĝis maturiĝo.


Liu Ĝu tutkore servas al la revolucio kaj kolektivo kaj pro tio la komunumanoj varme laŭdis: “Kvankam Liu Ĝu estas grandaĝa, sed li havas ruĝan koron, kaj li ja estas lerninda ekzemplo por ni!”

Grena Produkto el Ŝtonvalo

LA raporto *Diligente kaj Ŝpareme Entrepreni Kooperativojn kaj Konstrui Montregionon*, kiun persone sankciis la granda gvidanto Prezidanto Maŭ antaŭ 14 jaroj, kuraĝigas nin en la batalo kontraŭ la naturo, kaj dank' al tio granda sukceso estis rikoltita. En la pasintaj dekelkaj jaroj, strikte sekvante Prezidanton Maŭ la popolo de Higoŭ marŝis antaŭen per gigantaj paŝoj. En 1964, Prezidanto Maŭ faris la grandan alvokon "lerni de Daĝaj en agrikulturo" kaj sub la direktado de la alvoko la popolo de Higoŭ marŝis antaŭen en venko prenante Daĝaj-brigadon kiel ekzemplon.

Higoŭ-brigado situas sur iu kresto de Tajhangmontaro, Pingŝun-gubernio de Ŝanhi-provinco. Ĝin ĉirkaŭas ŝtonvaloj. En la 21 jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio, sub la direktado de Maŭzedongpenso, nia Higoŭ disvolvis la spiriton de sinapogo sur propraj fortoj kaj penema luktado kontraŭ malfaciloj kaj precipe en la lastaj kelkaj jaroj lernis la revolucion spiriton de Daĝaj, Higoŭ multe ŝanĝiĝis. Oni diris: En la pasinteco ĉio nin ĉagrenis, kiam al Higoŭ ni alvenis; nun kiam ni al ĝi alvenas, je vidindaĵoj ĝi plenplenas. Nun, dekmil muoj da pinoj kaj cipresoj kaj pli ol miliono da mate-

Riĉa rikolto de pomoj



rialaj arboj kovras montojn de Higoŭ; verdas tie ankaŭ kelkdek miloj da juglandarboj kaj dekmil pomarboj. Sur montdeklivoj paŝtiĝas bovoj kaj ŝafoj en gregoj, en la valoj stariĝis 500 akvobaraĵoj, kaj sur rivera bordoetendaĵo stariĝis granda digo 6,000 metrojn longa. En la pasinta jaro, la pomua produktokvanto de greno atingis 812 ĝinojn, kaj la totala produktokvanto duobliĝis kompare kun tiu de 1963, la jaro antaŭ lernado de Daĝaj.

En la pasinteco, Higoŭ estis malriĉa loko. Kiam komenciĝis la Kontraŭjapanana Rezistmilito, la Okavoja Armeo gvidata de Prezidanto Maŭ venis al Tajhangmontaro kaj liberigis la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn de Higoŭ el sub la tri grandaj montoj — imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo. Hisiĝis la ruĝa kvinstela flago sur Tian-anmen-placo kaj fondiĝis la nova Ĉinio. Prezidanto Maŭ plurfoje donis aŭdiencon al la reprezentantoj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Higoŭ, instruante nin bone konstrui la montregionon. La intima zorgo de Prezidanto Maŭ fariĝis giganta forto kaj lia granda instruo ja estas la direkto de antaŭenmarŝo por la popolo de Higoŭ. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris: Ni devas gravuri la instruojn de Prezidanto Maŭ en la koron kaj nepre bone konstruos Higoŭ por glorigi Prezidanton Maŭ.

Sub la gvido de Li Ŝunda, en vintro de 1951, Higoŭ fondis produktajn kooperativojn por konstrui novan montregionon. Sed ĉie troviĝas montoj de kie oni komencu la laboron? Kamarado Li Ŝunda mobilizis la amasojn al diskutado. Fine ĉiuj venis al jena konkludo: por konstrui la montregionon oni devas komenci de la montpintoj; por multe rikolti grenon, oni devas unue planti arbojn. Li Ŝunda diris: “Se ni plantos arbojn, ni plantu pinojn kaj cipresojn, por ke la loko verdu en ĉiu sezono.” Tion ĉiuj aprobis. Poste, ili plantis persikarbojn, abrikotarbojn, pirarbojn k. a. fruktarbojn jaron post jaro. Post tri jaroj la arbedoj



Kamaradino Ŝeng Gilan estas inter komunumanoj.

jam komencis flori. Kaj kiam floris la persikarboj kaj abrikotarboj, ankaŭ la pinoj kaj cipresoj, plantitaj antaŭ kelkaj jaroj, multe kreskis. Kiam venis printempo, la montojn kovris floroj kaj verdaĵoj, kio pli grandigis la memfidon de la amasoj en transformo de la naturo. En pena laborado de dekkelkaj sinsekvaj jaroj, ni plantis dekmilmuojn da pinoj kaj cipresoj kaj pli ol centmil fruktarbojn.

Post la plantado de arboj sur la montoj, ni ekkonstruis akvobaraĵojn en la valoj. Ni konstruis desupre malsupren laŭ la valoj akvobaraĵojn por bari monttorenton. Tiu laboro estis pli malfacila ol la plantado de arboj. Unue oni devis dehaki rokojn de la montoj kaj fari fosojn por digo kaj poste masoni akvobaraĵojn tavolon post tavolo. Dank' al la granda entuziasmo de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Higoŭ, la produktado disvolviĝis jaron post jaro. En 1963, la pomua produktokvanto de greno atingis 400 ĝinojn.

En 1964, la granda gvidanto Prezidanto Maŭ faris la alvokon “**lerni de Daĝaj en agrikulturo**”, kaj tion varme respondis la popolo de nia Higoŭ.



La alta labora entuziasmo de daĝaj-anoj nin stimulis. En tiu jaro, la pomua produktokvanto de greno kreskis ĝis 600 ĝinoj. Ni tamen ne malstreĉis nian penadon post tiu atingo, sed laboregis same kiel antaŭe.

En Daĝaj estis dezerta ravino kaj en Higoŭ ŝtoneca bordoetendaĵo. Ekde 1954, ni komencis konstrui digon kaj plenigi bordoetendaĵon per tero, sed malmulte atingis. Lernante de Daĝaj, pli altiĝis nia entuziasmo kaj ni elmetis la sloganon transformi la bordoetendaĵon en grenproduktejon en tri jaroj. Sekve de tio ni tuj eklaboris energie. Sed Higoŭ karakteriziĝas per tio, ke ŝtonoj kovris la bordoetendaĵon ambaŭflanke de la rivero. Por terkulturi tie oni devis krei kampojn. Por konstrui kampon tie kvar procedoj devis esti faritaj: Unue konstrui digon, due konstrui kamprandajn murojn, trie ebenigi la ŝtonecan bordoetendaĵon kaj fine kovri ĝin per tavolo de grundo alportita de malproksime. Neniu procedo povis esti ŝparita.

Por solvi la problemon de nesufiĉeco de laboruloj, ni koncentre faris la laboron de kampokreo en vintro. Tion farante en la plej malvarmaj tagoj ni renkontis grandan malfacilon de frostiĝo de la tero. Sed plenaj de energio la malriĉkampanoj

kaj malsuperaj mezkampanoj de Higoŭ diris: "Jen kio estas penema luktado kontraŭ malfaciloj." Kun la daĝaj-anoj kiel nia ekzemplo, ni povas venki malfacilon kiom ajn grandan.

Ekde la pasinta jaro, alte tenante la standardon de unuiĝo kaj venko de la Naŭa Kongreso de la Partio, ni sukcese plenumis la taskon de konstruado de digo kaj kampoj dank' al penado de unu jaro. Nun sur la riverborda etendaĵo aperis granda ŝtondigo 6,000 metrojn longa. Sub la protekto de la digo, pli ol 400 muoj da bonaj kampoj estas kreitaj sur la etendaĵo. Dank' al akiro de tiuj kampoj, radika ŝanĝiĝo okazis al la fizionomio de Higoŭ. En la jaro 1963, la pomua produktokvanto de greno de Higoŭ estis ĉ. 400 ĝinoj, kaj en 1964 ĝi jam kreskis ĝis 600 ĝinoj. En 1969, en tiu produkta brigado situanta sur kresto de Tajhang-montaro la meznombra pomua produktokvanto de greno saltis al 812 ĝinoj, kaj la brigado liveris al la ŝtato 200,000 ĝinojn da superbezona greno kaj kelkcent mil ĝinojn da pomoj.

**La aŭtorino estas tutlanda labormodelo, vicsekretario de la partia ĝenerala filio de Higoŭ-brigado de Pingŝun-gubernio.*

Gazetoj el Ĉinio

El Popola Ĉinio — Monata Esperanta gazeto riĉe ilustrita kun ĝenerala enhavo.

Pekina Revuo — Semajna gazeto politika kaj teoria por propagandi Marksismon-Leninismom-Maŭzedongpenson. Ĝi aperas en la angla, franca, germana, hispana kaj japana lingvoj kaj estas distribuata aerpoŝte tra la mondo.

Ĉinio — Grandformata monata gazeto kun belaj bildoj kaj lakonaj tekstoj. Ĝi aperas en la ĉina, angla, franca, germana, japana, rusa, hispana, araba, hindia, indonezia, itala, sveda, korea, ŝahilia, urdua kaj vjetnama lingvoj.

Ĉinio en Konstruado — Monata gazeto riĉe ilustrita kun ĝenerala enhavo. Ĝi aperas en la angla, franca, hispana, araba kaj rusa lingvoj.

Ĉina Literaturo — Literatura kaj arta gazeto eldonata monate en la angla lingvo kaj trimestre en la franca.

Popola Ĉinio — Monata gazeto kun ĝenerala enhavo eldonata en la japana lingvo.

Akcepto de abonoj por la jaro 1971 komenciĝas nun.

Bonvole abonu la gazetojn. Katalogo estas sendata laŭ peto.

Distribuas: Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), Pekino, Ĉinio

Abonu ĉe lokaj agentejoj aŭ rekte ĉe Gazeta Fako,

Guozi Shudian, P. O. Kesto 399, Pekino, Ĉinio

Por aboni "El Popola Ĉinio" vin turnu al lokaj perantoj

aŭ rekte al la Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo,

P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Grenvendejo Tutkore Servanta al la Popolo

SUPER la pordo de la 19-a grenvendejo de Dongfeng-distrikto de Hi-an, pendas okulfrapa ruĝa tabulo kun la ore brilaj vortoj de Prezidanto Maŭ: **Servu al la Popolo.** Tio estas maksimumo por la revoluciaj komercaj laborantoj de la 19-a grenvendejo.

La 19-a grenvendejo havas la taskon provizi grenon al pli ol 1,600 familioj kun pli ol 5,600 homoj. La laborantoj de tiu vendejo ofte diras: “Servi al la amasoj, ke ili aĉetu grenon per plej malmulta tempo kaj plej malmulta vojiro, ja signifas subteni la socialisman konstruadon, kaj tio estas la plej glora tasko por ni komercaj laborantoj.” En iu tago nelonge post la fondiĝo de la grenvendejo, ventegis kaj pluegis, grenaĉetantoj estis malmultaj. La vendejestro-kompartiano Vang Huajning diris: “La laboristoj kaj kadroj ĉiuj laboras sinforgese por la socialisma konstruado, kaj en iliaj hejmoj restas nur maljunuloj kaj infanoj, por kiuj estas pli malfacile veni al ni por aĉeti grenon en tia vetero. Ĉu decas, ke ni atendu ĉi tie klientojn!” Laŭ propono de Vang Huajning, la laborantoj tuj ekagis. En la vento kaj pluvo, ili portis al la domoj de la amasoj rizon kaj tritikan farunon per ĉaro kovrata de vakstolo kaj dikaj jutsakoj, kaj tiel ankaŭ liveris en ilian koron la varmon de la Partio.

Post kelkaj tagoj, ili rimarkis, ke ofte venis al ili homoj, kiuj aĉetis grenon por aliuloj. Post pridemandado, ili informiĝis, ke tiuj aĉetis grenon por maljunuloj, malfortuloj, malsanuloj kaj kripluloj. Aŭdinte tion la laborantoj de la grenvendejo tre maltrankviliĝis kaj konsciis, ke ili ne bone plenumis sian devon. Ili tuj vizitis la loĝantojn por

enketo kaj rapide akiris necesajn informojn pri la familioj. De tiam, ili persistas en porto de rizo kaj faruno al la domoj de familioj de martiroj kaj armeanoj kaj al maljunuloj, malfortuloj, malsanuloj kaj kripluloj en ĉiu monato, kaj tiun servon ili faradas de multaj jaroj seninterrompe, malgraŭ venta aŭ pluva vetero.

Por ke la amasoj ĉiutage povu aĉeti grenon ĉe la vendejo, de la jaro 1958 ĝis nun la 19-a grenvendejo en neniu tago ĉesigis sian servon, ĉu en festotago aŭ ferio, ĉu en tempo kiam la laborantoj kunvenas, lernas aŭ kontrolas la stokon.

Post la venka fermo de la Naŭa Kongreso de la Partio en la pasinta jaro, la revoluciaj komercaj laborantoj de la 19-a grenvendejo levis novan ardan tajdon de viva studo kaj viva apliko de la “tri popularaj artikoloj” kaj firme decidis plibonigi sian servon. Ili invitis revoluciajn amasojn partopreni pli ol 20 kunsidojn kaj enprofundiĝis en iliajn hejmojn por peti opiniojn. Ili informiĝis, ke sub la stimulo de la Naŭa Kongreso de la Partio, senprecedence altiĝis la revolucia aktiveco de la vastaj revoluciaj amasoj en teno de la revolucio kaj stimulo de la produktado, kaj tiuj deziras aĉeti grenon matene, tagmeze aŭ vespere, por ne okupi tempon de revolucio kaj produkto. Laŭ la opinio de la amasoj, la grenvendejo tuj komencis tuttagan servon kaj varme akceptas klientojn en ajna tempo.

La komercaj laborantoj de la 19-a grenvendejo senĉese plibonigas sian servon laŭ la opinioj kaj postuloj de la amasoj. Iutage en aŭgusto de la pasinta jaro, post aĉeto de greno, iu laboristo diris al si mem: “Post aĉeto de greno, mi ankoraŭ de-

*Por favori al la amasoj,
la grenvendejo vendas
ankaŭ oleon, salon,
sojan saŭcon, vinagron
kaj aliajn.*



vas iri al butiko de flankmanĝaĵoj por aĉeti sojan saŭcon, kaj duontago forkonsumiĝos en tia kurado.” Liaj vortoj vekis atenton de Ĵen Ĉang-an, juna laboranto de la vendejo. En kunveno de tiu sama tago, li transdiris la vortojn de la laboristo al la aliaj kaj proponis, ke la grenvendejo vendu ankaŭ oleon, salon, sojan saŭcon, vinagron k. a. je oportuno por la amasoj. Lia propono kaŭzis varman disputon inter la ĉeestantoj. Iu diris: Grenvendejo de ĉiam okupiĝas nur pri vendo de grenoj. Ĉu ĝi ne fariĝas “ĉiovendejo”, se ĝi vendus ankaŭ oleon, salon, sojan saŭcon kaj vinagron? Aliaj opiniis, ke oni devas subteni la proponon kaj tute ne kalkuli la aldonan okupon por pli bone servi al la amasoj. Vang Huajning gvidis ilin studi instruon de Prezidanto Maŭ: “Ni devas profunde atenti pri la ĉiutaga vivo de la amasoj, de la problemoj de tero kaj laboro ĝis tiuj de brulaĵo, rizo, oleo kaj salo.” La instruo de Prezidanto Maŭ unuigis ilian penson kaj ili ĉiuj esprimis, ke ili prenos sur sin la taskon de aranĝo de la vivo de la amasoj. Dirite, tuj farite. En nur kelkaj tagoj ili jam komencis vendi oleon,

salon, sojan saŭcon, vinagron k. a, kio estis tre bonvena al la amasoj.

La revoluciaj komercaj laborantoj de la 19-a grenvendejo ĉiam kontrolas sian laboron per la instruo de Prezidanto Maŭ “**tutkore kaj tutanime servi al la popolo**” kaj meminitate helpas klientojn en solvo de malfaciloj. Kiam la vendejo provizas en malgranda kvanto milion, fazeolon k. s, ofte okazas, ke aĉetantoj ne kunportas necesajn ujojn kaj ne scias kion fari. Laborantoj de la vendejo mem faris paperajn sakojn por kontentigi la bezonon de klientoj. Kaj krome, ili ĉiam havas sur la vendotablo kudrilojn, fadenojn kaj ŝnuretojn por ke aĉetantoj fliku aŭ ligu siajn grensakojn en okazo de hazarda bezono.

Sub la helpo de la maljunaj kamaradoj, komizojnulo Caŭ Ŝukin vive studas kaj vive aplikas la “tri popularajn artikolojn”, senĉese profundigas konon pri la signifo de sia laboro kaj ŝi rapide stariĝis profundan proletaran amikecon en rilato kun la amasoj, persistante en la aktivado de vizito al

la loĝantoj. Foje, Caŭ Ŝukin informiĝis, ke iu kamaradino akuŝis. Apenaŭ ŝia edzo ŝin venigis hejmen, Caŭ Ŝukin jam aĉetis por ŝi sekigitajn vermiĉelojn kaj du porkopiedojn. Tion vidinte, ŝiaj najbaroj diris: “Ŝukin staras kun ni koron ĉe koro kaj ŝi scias, kion ni bezonas.”

En la kontraŭa flanko de la grenvendejo estas hospitalo kun simplaj malsanulaj ĉambroj, en kiuj malsanuloj povas memprepari por si manĝon. La laborantoj de la grenvendejo ofte vizitis la malsanulojn por scii iliajn bezonojn. Se iuj malsanuloj deziras rizon por fari kaĉon aŭ vermiĉelon, ili tuj mem portis tion en la malsanulajn ĉambrojn. La malsanuloj estas tre kontentaj pri la perfekta servo de la grenvendejo. Multaj el ili vizitis, je sia forlaso de la hospitalo, la grenvendejon por diri adiaŭon kaj esprimis, ke ili penas teni la revolucion kaj stimuli la produkton post reveno al sia laborposteno por danki la prizorgon de Prezidanto Maŭ kaj la Partio per konkretaj agoj. Kaj en returno, la agoj

de la amasoj edukis la laborantojn de la grenvendejo, kaj ĉi tiuj diris kun profunda kompreno el sia sperto: “La grenproviza laboro estas ankaŭ politika laboro. Dank’ al nia servado, popolaj amasoj pli varme amas Prezidanton Maŭ, pli varme amas la Partion kaj pli varme amas la novan socion. Tio signifas, ke ni faris kontribuon al la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.” Ĉar ili memkonscie interligis sian okupon kun la tuta revolucia afero, ili plenumas sian servon ĉiam pli bone. En la pasintaj dekelkaj jaroj, la grenvendejo estis elektita seninterrompe kiel avangarda kolektivo kaj fariĝis ruĝa standardo de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso sur la komerca fronto de Ŝenhi-provinco. La laborantoj de la 19-a grenvendejo rigardas tion kiel la plej grandajn kuraĝigon kaj stimulon de la Partio kaj la vastaj amasoj al ili. Ili diris: En revoluciado ne troviĝas la lasta stacio. Ni nepre lernados la “tri popularajn artikolojn”, reformados nian mondkoncepton kaj tutkore kaj tutanime servos al la popolo dum la tuta vivo!

Komizoj de la grenvendejo petas de la amaso opiniojn.





Rakonto pri Dek Juanoj

POSTTAGMEZE de iu sabato, iu klientino postlasis monbileton de 10 juanoj sur kontortablo en la ŝparkasejo de la strato Ŝimenjilu, Ŝanhajo. Kiam oficistoj de la ŝparkasejo tion trovis, oni tuj eliris por serĉi la klientinon sed ŝin ne trovis.

Kion fari? Oni decidis afiŝi sur la pordo por sciigi al la perdinto, ke ŝi reprenu sian monon. Ĝis la tempo por fermi la oficejon, tamen neni venis por serĉi la monon. Tiam la respondeculino de la ŝparkasejo kamaradino Ĝaŭ ekmaltrankviligis. Ŝi pensis: La perdinto certe estas tiel ĉagrenita, kiel ni ĉe okazo de malegalo en vespera monkkalkulo. Sed kiel oni trovu la perdinton?

La sekvinta tago estis dimanĉo, dum kiu la ŝparkasejo funkciis nur antaŭtagmeze. La oficistoj denove diskutis la aferon post legado de la "tri popularaj artikoloj" antaŭ la malfermo de la oficejo.

"Ĉu tio povas esti kalkulita kiel 'ekskluzive' kaj 'senrezerve' servi al la popolo, ke oni nur afiŝis por sciigi la perdinton, kiam oni trovis ties monon?" Kamaradino Ĝaŭ elmetis la demandon.

Post diskutado ili venis al la konkludo, ke oni devas fari ĉiujn klopodojn por trovi la perdinton.

Sed, kie oni povas ŝin trovi? Tiam ĉiuj klopodis rememori pri la klientino. Kamarado Vang rememoris ke la klientino foje parolis kun kamaradino Ŝen pri rondirado por doni kuracajn helpojn en kamparo. Sed bedaŭrinde, kamaradino Ŝen estis tiutempe en forpermeso. Tamen, oni konjektis ke ŝi estas eble kuracistino. Memorante ke ŝi hieraŭ venis kun infaneto, oni plie konkludis ke ŝi nepre loĝas en proksimeco.

Lunde, kamaradino Ŝen venis al la oficejo. Oni tuj informis ŝin pri la afero. Post pena rememoro, ŝi diris ke la klientino parolis ankaŭ pri sia kuraco por iu infano. El tio oni supozis ke eble la perdinto estas infankuracistino en la hospitalo Jan-an en proksimeco.

Posttagmeze de la sama tago, kamaradino Ĝaŭ speciale iris al la nomita hospitalo kaj petis helpon de ties revolucia komitato post detala rakonto pri la afero. Post analizo de la afero estis alvokita per telefono iu doktorino Ĝang.

Je knaro de la malfermata pordo, eniris la doktorino, kiu estis ĝuste la klientino! Kun ĝojo kamaradino Ĝaŭ iris al ŝi kaj premis al ŝi la manon.

"Ĉu vi ne prenis monon de nia ŝparkasejo sur Ŝimenjilu ĉ. la 2-a horo posttagmeze de la lasta sabato?"

"Jes", respondis doktorino Ĝang. "Mi prenis 48.96 juanojn el mia konto. Poste mi trovis ke mankas al mi dek juanoj."

"Kial vi ne venis al nia oficejo por serĉi la monon?" redemandis kamaradino Ĝaŭ.

"Mi serĉis ĉie, sed ne venis al via oficejo, pensante ke vi ne povas miskalkuli la monon", diris la kuracistino.

La respondo estis ekster la atendo de kamaradino Ĝaŭ. Redonante al ŝi la trovitan monon, ŝi pensis en si: La amaso ja tiel kredas al ni! Ni do devas pli serioze lerni la "tri popularajn artikolojn" kaj pli alte levi la kvaliton de nia laboro por ne vanigi la konfidon de la amaso al ni.

Korespondi Deziras

BELGIO

30-jara Petro Notaerts dez. kor. kun alilandanoj kaj interŝ. ideojn pri oportuneco de Esperanto, pri kuriozaĵoj en ĉiuj lingvoj (precipe pri la ĉina). La adreso: Draverslaan 10, B-1710 Dilbeek.

ĈEĤOSLOVAKIO

Pensiulo, sperta esperantisto Konstantin Mikuliĉ dez. kor. kaj interŝ. diverslandajn uzitajn p. m. La adreso: Malacky 329.

50-jara tipografisto Karol JAMRICH dez. kor. kun tutmondaj amatoroj pri astronomio. La adreso: Malacky 21.

Dez. kor. Drahusa Stanekova, Doprastav — stavba TEES Martin.

68-jara pensiulo Otakar Mesnidal dez. kor. kun geesperantistoj de Albanio, Aŭstralio, Afriko, Latinameriko, Italio kaj Grekio kaj interŝ. bildkartojn kaj diversajn temojn. La adreso: Ujezd u Brna 679.

GDR

43-jara sportselista Siegfried Hornig dez. kor. kun ĉinaj kaj alilandaj geesperantistoj. La adreso: 808 Dresden 8, Königsbrucker-Landstr. 48

Sur la Kovrilo:

Ruĝgardianetoj varme krias:
“Vivu Prezidanto Maŭ!”

Sur la Dorskovrilo:

En la festotago kiam la tuta lando ĝoje celebras la 21-an datrevenon de la fondiĝo de la granda Ĉina Popola Respubliko, la vastaj revoluciaj amasoj de la ĉefurbo kantante kaj dancante trapasas Tian-anmen-placon, varme aklamante la grandajn atingojn en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de nia lando.

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報通

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 12 (149) 1970

Ĉefa Enhavo

Parolado de Vicprezidanto Lin Biaŭ en la Mitingo por
Celebri la 21-an Datrevenon de la Fondiĝo de la Ĉina
Popola Respubliko

Gaja Nacia Festotago

Realigis la Deziro de Laboristoj, Kamparanoj kaj Soldatoj

La Liberĉiela Karbominejo Hongvej

Fluge Impetas la Agrikultura Mekanikigo

La Komerco de Nia Lando en Prospero

Serĉo de Nova Vojo por Alta Produkto de Rizo

Impresoj de Francaj Amikoj pri Vizito al Ĉinio

Korea Tablotenisa Teamo Vizitis Ĉinion

Fotoekspozicio pri Vjetnamio en Pekino

Heroa Pafisto

La Revoluciaj Flamoj Neestingebraj

Kiel Agu Ĥirurgo


Novaj Homoj kaj Aferoj sur la Stepo

Grena Produktejo el Ŝtonvalo

Grenvendejo Tutkore Servanta al la Popolo

Strikte Sekvi la Grandan Gvidanton Prezidanto Maŭ Signifas Venkon

Alte tenante la brilan standardon de "la Ĉarto de Anŝan-a Ferŝtala Kompanio", la vastaj amasoj de laboristoj de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio forte rompis teorion pri "neŝangebleco de tipaj difinitaĵoj de entrepreno", kaj dank' al tio ĝia ferŝtala produkto daŭre levigas en ĉiuj flankoj. Jen granda kvanto da bonkvalitaj ŝtalajoj atendas transporton.







Komunumaninoj de Jouseng-brigado de Kjuantang-komunumo de Pinghu-gubernio, Ĝegiang, elektas nove rikoltitan kotonon por vendi ĝin al la ŝtato.



(Maldekstre supre) La vastaj amasoj de partianoj de Anjuan-karbominejo, Gianghi-provinco, pluapase elvolvas rolon de la proletara avangardo en la tri grandaj revoluciaj movadoj. Jen sekretario de la partia filio Pan Ŝigaŭ (maldekstre) kune kun laboristo firme tenas la revolucion kaj forte stimulas la produkton.

Sub la brilo de la ĝenerala linio de la Partio, la agrikulturo de nia lando akiris riĉikolton en sinsekvaj 8 jaroj. En la kuranta jaro, Hiagia-cun-brigado de Dongfeng-komunumo de Kjufo-gubernio, Ŝandong, refoje akiris tritikon riĉikolton venkinte seriozan sekegecon.



La Ĉina Popola Liberiga Armeo armita per Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso plene elvolvis la rolon de bazŝtono de la proletara diktaturo, profunde plenumante la spiriton de la rezolucioj de Gutian-kunveno kaj la Plivastigita Kunveno de Komisiono pri Militaj Aferoj de CK de KPC.

La 17-a Mezlernejo de Huhehoto de la Interna Mongolio fondis Maj-sepan Fabrikon de Radiaparataj Pecoĵ sinapoganti sur la propraj fortoj. Jen la lernantinoj lernas radian teknikon sub helpo de laboristo.

实现无产阶级教育革命，必须有工人阶级领导，必须有工人群众参加，配合解放军战士，同学校的学生、教员、工人中决心把无产阶级教育革命进行到底的积极分子实行革命的三结合。工人宣传队要在学校中长期留下来，参加学校中全部斗、批、修任务，并且永远领导学校。





La floroj de Daĝaj floras ĉie tra la tuta lando. Prenante Daĝaj-brigadon kiel sian ekzemplon, Higiubi-brigado de Giedukomunumo de Hijanggubernio, Sanhi-provinco, levas novan alttadjon de viva studo kaj viva apliko de la "tri popularaj artikoloj".



Firme irante la vojon de Daĝaj, komunumanoj de Bajjinghile-brigado de Ulanĉabu-ligo akiris grandan prosperecon de brutaro en sinsekvaj 4 jaroj.

